Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 27 - trimonata

2/97

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktoro: Jozefo NÉMETH

Vicredaktoro: Katalin SMIDÉLIUSZ

Kunlaborantoj: Stefan MacGILL, Johano KIRSCH, Françoise NOIREAU, Atilio ORELLANA ROJAS kaj Franz-Georg RÖSSLER

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): R. Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende

IPR

Redaktejo: NÉMETH József
HU-8500 PÁPA, Kilián ltp. 75/9
☎ + 36-89-315-836, 🖷 nlalt@konyvtar.c3.hu

Presado: Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140,
BE-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

ENHAVO

Duncan Charters: *Multkultureco kaj lingvolernado* 1
dr. Katalin Smidéliusz: *Projektoj, eksperimentoj, propedeŭtika valoro* 4
Gabriella Horváth: *Analizado de IPR - Pri la enhavo* (3-a, lasta parto) 8
Demandoj – re(t)spondoj 10
Landoj kaj sekcioj 14
N. Csiszár – S. Trenner: *Spertoj de internacia infana interŝanĝo* (2-a parto) 22
ILEI *Jarraporto '96* (M.B.) 25
ILEI *estrarkunsido en Parizo* (M.B.) 29
Recenzoj (J. Bishop, Z. Banet-Formalowa, F.G. Rössler) 31
Memorigo pri Katina Dacini (Stoppolini) 34
Faksilon al E-lernejoj? 36
Postparolo (J.N.) 36

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: d-ro Duncan Charters, 25 Elsah Hills Drive, Elsah, IL 62028-9750 Usono; tel. 1-618-374-2453, fakso: 1-618-374-5465. Rete:charters@prin.edu. *Kunordigo, instruista trejnado.*

Vicprezidanto: Brunetto Casini, Casella Postale 213, IT-56100 Pisa, Italio tel. 39 50/48 670, fakso 39 50/50 05 85. Rete: edistudio@sirius.pisa.it *Planado.*

Sekretario: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. (385 1) 576092. Rete: marija.belosevic@public.srce.hr. *Landaj sekcioj, membro-varbado, rilatoj kun UEA kaj la movado, servoj al instruistoj.*

Kasisto: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby. Tel. (46 415) 501 52. *Financo, konferencaj financoj. Membraro.*

Vic-sekretario: Prof. Zhang Danchen, North Area 14-dong, 34-hao, Huazhong Normal Univ., CN-430070 Wuhan, Ĉinio. Internet: dedhea@public.wh.hb.cn *Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio kaj Azio.*

Membro: Mag. Atilio Orellana Rojas, Casilla de Correo 1428, AR-5000 Córdoba, Argentino. Tel. kaj fakso +54-51-520065. *Konferencoj, ekzamenoj.*

Membro: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende, Belgio, Tel. (32 59) 502708. *Eksteraj rilatoj.*

Estrara komisiito: Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono. Tel. (314) 869-2303. Rete: rglosso@siue.edu *Instruado de infanoj.*

Estrara komisiito: Zsuzsa Barcsay, Bem Rakpart 25/B, HU-1011 Budapest, Hungario. Tel. (36 1) 201-2342. *Gimnazio de ILEI.*

Estrara komisiito: Stefan MacGill, Fácán köz 9/2, HU-2030 Érd, Hungario. Tel. (36 23) 363-280. *Eldonado*

Observanto (UEA): Renée Triolle, 4 impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio

DUNCAN CHARTERS:

MULTKULTURECO KAJ LINGVOLERNADO

Kial interesas nunmomente la temo de la ĉi-jara konferenco de ILEI en Lara, Aŭstralio?

De kelkaj jaroj furoras tra la mondo politika debatado pri "multkultureco". Tiu fenomeno aparte rimarkeblas en la anglalingvaj landoj kie la enloĝantara plimulto havanta politikan regpovon tradicie vidis sin fundamente kiel rase, kulture, religie kaj lingve homogenan grupon, kun similaj valoroj kaj moroj de socia interkonduto. Tiun tradician komfortnivelon atencis en la memordaŭro de unu generacio minimume tri fenomenoj: konsciiĝo kaj aktiviĝo de internaj indiĝenaj kaj minoritataj grupoj rilate siajn homajn kaj sociajn rajtojn; amasa enmigrado, inkluzive de politikaj rifuĝintoj, el neeŭropaj landoj; kaj la simpla fakto, nun ne plu preteratentebla pro la penetro de amaskomunikila raportado de
popolstatistikoj kaj politikaj liberiĝoj, ke sur la monda scenejo anglalingvaj blankhaŭtaj eŭropanoj estas ŝrumpanta malplimulto.

Kompreneble la fenomeno ne limiĝas al anglalingvaj landoj. En Eŭropo, gastlaboristoj en Germanio kaj aliaj landoj per sia alveno neeviteble naskis streĉitajn situaciojn rilate kulturan kaj lingvan integriĝon, klasan kaj rasan diskriminacion. La historiaj rilatoj inter la francaj kaj alĝeriaj popoloj kreis daŭrajn sociajn konfliktojn kies definitivan solvon defias la nunaj cirkonstancoj. Demokratiiĝo en Hispanio plividebligis la diversecon de la kulturaj kaj lingvaj tradicioj de la lando, kaj konfliktojn pro sentitaj diskriminacioj kaj mankon de subteno aŭ de sufiĉa aŭtonomio kontraŭ influo de la reganta nacia kulturo kaj lingvo. Profunde enradikiĝintaj etnaj konfliktoj kaj suspektiĝoj plievidentiĝis dum la politika transiro en eks-Sovetunio kaj postkomunisma Eŭropo. Afriko, Azio, kaj Ameriko prezentas severajn kazojn de malakceptemo de minoritataj kulturgrupoj internaj kaj eksterdevenaj. Pasintseptembre en nia gastiga lando Aŭstralio rimarkoj de nova parlamentanino Pauline Hanson spronis pli malfermitan nacian debaton pri du tipaj aspektoj de la problemo: la percepton de parto de la tradicia plimulto ke la registara politiko nun efektive diskriminacias kontraŭ ili kaj favore al aborigenoj, kaj ke la alfluo de enmigrantaj Azianoj minacas la tradiciajn valorojn kaj kulturon.

Kiajn sekvojn havas tiaj situacioj por naciaj registaroj kaj edukinstancoj?

Ambaŭ tipe prenas al si duoblan respondecon: respektigi kaj konservi la t.n. "tradiciajn valorojn" edukante lernejanojn por ke ili havu k.e.p. larĝan perspektivon pri la diverseco de la historiaj kontribuintoj al ili, kaj eduki al socia toleremo kaj respekto en rilatoj kun alikulturanoj en kaj ekster la lando.

El tiuclaj diskutoj ofte naskiĝas novaj leĝoj aŭ lernprogramoj. Se tiaj oficialiĝas kiel nacia eduka politiko, plejofte aperas ankaŭ protestoj kaj rezistmovadoj. Unu

retloko bazita en la urbo plej apuda al mia loĝloko en Usono provizas k.e.p. multajn informfontojn pri la danĝeroj de multkultureco. Sur la ekrano aperas turniĝanta mortokranio nomita "S-ro Morto-Tra-Diverseco", kiu montras la vojon al centoj da artikoloj reliefigantaj etnajn misfarojn kaj konfliktojn kiuj laŭ la vidpunkto de la aŭtoroj pruvas ke la kuraĝigo de kultura diverseco minacas mortigi la homan socion. Kiam okazas publikaj diskutoj kaj debatoj, akuzojn pri rasismo oni senprokraste lanĉas kaj rebatas, kaj la necesan racian dialogon povas facile venki plej emociaj asertoj.

En multaj naciaj kulturoj, ekzistas tradicia akcepto de la premiso ke la popolo forĝiĝis kaj unuecigis el malsamaj etnaj elementoj, kaj pro tio jam estas fundamente "diversa". Sed ne malmultaj sociologoj insistas ke plejofte venkis unu superreganta kulturo kiu sukcesis sorbi la aliajn, forigante iliajn apartaĵojn sen signifaj siaflankaj modifoj. Naskiĝas kaj kreskas sociaj konfliktoj kiam anoj de minoritata kulturo rekonas kaj kontrŭbatalas tian asimiliĝon, kies ĉefa imagbildo estas la fandujo. La problemo pri tiu koncepto tuj evidentiĝas. Fandujo kreas unuecon malaperigante ĉian diversecon de la alportitaj elementoj. Pro tio oni argumentas ke vera diverseco devas bildiĝi ne per fandujo sed per salatujo, kuniganta en harmonion la diversajn sociajn elementojn kiuj tamen ne perdas sian individuan identecon kaj la rekonon de ĉies kontribuo al la tuto.

La argumentoj kontraŭ multkultureco varias laŭ la apartaj cirkonstancoj, sed tiuj tamen ofte paralelas en sia celo bremsi la efikon de nedeziratai kulturaj ŝanĝoj en la socio. Ni prenu nur lingvajn ekzemplojn. Se oni pledas por la plivalorigo kaj subteno de la lingvo de minoritata indiĝena aŭ enmigrinta grupo, rezultas diverskialaj protestoj. La rekono kaj egalrajta uzo de aliaj lingvoj dividos la nacion! Oni devos senutile elspezi monon kiun oni povus uzi por sociaj programoj por tradukaj kaj interpretistaj servoj! La uzantoj de minoritataj lingvoj restos apartigitaj de la socio kaj ne povos plene integriĝi! Ili ne havos la saman liberecon elekti sian profesion, okupon, aŭ loĝlokon! Ekestos danĝeraj situacioj pro manko de komunikaj lingvokapabloj en krizaj situacioj! Tiajn protestojn oni tamen ne povas facilanime primoki. La demandoj estas kompleksaj kaj postulas inteligentan analizadon kaj solvoproponojn.

Antaŭ jardekoj, oni povis konstati strangan fenomenon en ne malmultaj usonaj lernejoj. La lernado de fremda lingvo emis esti privilegio de la elita klaso de pli socie favoritaj kaj inteligentaj lernantoj. En la sama lernejo, la lingvoscio de denaskaj parolantoj de tiuj samaj lingvoj kiujn oni instruis al la elito ricevis ne nur nenian rekonon sed eĉ malestimon, aparte se oni konsideris la lernantojn esti de malpli atinginta socia tavolo. Nuntempe, la naciaj asocioj de instruistoj de fremdaj lingvoj pledas por demokratiigo de la lingvoinstruado kaj rekono kaj kuraĝigo de la jam ekzistantaj lingvokapabloj en la familioj de enmigrintoj el neanglalingvaj landoj. Dulingvaj programoj sukcesas kiam ili refortigas la valoron de la gepatra lingvo de

enmigrintaj lernantoj kaj samtempe kondukas ilin al efika posedo de la angla. Tamen eĉ sukcesaj programoj estas suspektindaj se parto de la instruado okazas en la gepatra lingvo de la lernantoj.

Ĉu ni kiel instruistoj kaj instruantoj de E-o havu specifan starpunkton pri multkultureco kaj lingvolernado?

Fekunda temo por diskutado! Komence de la pritraktado de la demando ne tiom gravas eeli unuecon tiurilate, ĉar inter esperantistoj mi suspektas ke povas kunekzisti diversaj perspektivoj kaj aliroj. Ni tamen klopodu kiel eble plej objektive kompreni la nunan situacion en la mondo, kaj la rolon kiun povas ludi E-o en la pli efika realigo de celoj pri kiuj ni ĝenerale interkonsentas. La kritikantoj de multkultureco ofte trafe atentigis pri problemoj kiel tiuj pri kiuj e-istoj edukadas la mondon. Ĉu la rekono kaj lernado de multaj etnaj lingvoj interne de nacia socio vere alportas pli da kompreno, pli da kontaktoj inter diversgentanoj, pli bonan komunikadon? Ĉu vere ekzistas sufiĉe da tempo en lernejaj programoj por atingi teorie validajn celojn per pli vasta instruado de aliaj lingvoj? Ĉu teoria predikado de komprenemo de reprezentantoj de aliaj lingvoj kaj kulturoj havas nur pozitivan efikon, aŭ ĉu tio povas fremdigi la lernantojn de tiuj lingvoj kaj kulturoj ĉar ili ne mem rekte spertas komunikadon kun saminteresuloj je nivelo de vera lingva kaj kultura egaleco?

La lernado de "fremdaj" lingvoj (eĉ tiun terminon oni ĉiam pli klopodas eviti pro evidentaj psikologiaj kialoj) ofte ne rezultigas la deziratan komprenemon. La lernantoj oferas multajn horojn, en multaj klasejoj tedajn, por konstati ke tiuj horoj ne donis al ili la eblecon pliampleksigi transkulturan komunikadon, komprenemon, senperajn kaj naturajn kontaktojn kun alilingvanoj kaj alikulturanoj. La lernado de etna lingvo en klasejo ne nur ne aŭtomate forigas antaŭjuĝojn pri la popolo parolanta tiun lingvon. La malagrabla kaj tro ofte senrezulta sperto emas plifortigi ilin. La lernado de etna lingvo kaj kulturo preskaŭ neeviteble reliefigas diferencojn inter la gepatra lingvo kaj kulturo kaj la cel-lingvo kaj kulturo. Por tipaj lernejanoj, tiuj diferencoj fremdigas ilin de la kulturo, kaj eĉ povas konduki al primokado.

Ĉiuj lingvoinstruistoj devus pensi pri tio, ĉu ili prezentas la elementojn kiuj estas similaj, kiuj montras la unuecon de la homaro, kiuj kondukas al kompreno de la reciproka homeco de la lernantoj kaj la reprezentantoj de la cel-kulturo. Kiom pli facila la tasko de la instruisto de E-o, kiu povas frue kontaktigi siajn lernantojn kun aliaj gejunuloj de similaj interesoj sen limigo de kulturo aŭ mondparto, kaj kies lernantoj komunikiĝos je lingvo sama psikologia nivelo? Kiom pli valora povas esti konscio pri la unuecigaj faktoroj de la tuthoma kulturo kiam lernantoj komunikiĝas senpere, anstataŭ konstanta konscio pri diferencoj kaj lingvo malfaciligita transpontigo de tiuj diferencoj. Sen la vivspertoj kaj homaranisma ideologio de la iniciatinto de E-o, ĉu la lingvo mem estus povinta daŭre ekzisti kaj fari sian kontribuon al la plej altaj

celoj de tio kion ni hodiaŭ nomas multkultureco? Certe la plej nobla multkultureco respektus, aplaŭdus kaj forigus barilojn al kompreno pri la homa diverseco. Sendube la uzo de nediskriminacia komuna interkomprenilo estus logika instrumento por forigi antaŭjuĝojn pri aliaj homoj, aliaj kulturoj, aliaj lingvoj. Kaj nepre pli emus unuigi ol fremdigi la homaran komunikilon kies strukturo permesas pli liberan esprimon de ideoj kaj sentoj sen esenca favorigo de etne bazita lingvogrupo aŭ nacia kulturo.

Kian potencialon havas la internacia lingvo por montri alian, pli rektan vojon al la celo ol tiu kiun ĝis nun vidis la pasiaj advokatoj kaj kritikantoj de multkultureco en siaj nunaj manifestacioj? Tiun demandon nur ni kapablas respondi. De la praktika konvinkiĝo pri tiu respondo kaj la klareco per kiu ni prezentos ĝin povas dependi la venontaj paŝoj en la plena utiligo de E-o por atingi la edukajn celojn al kiuj necesse strebadas nia nuntempa mondo.

DR. KATALIN SMIDÉLIUSZ:

Projektoj, eksperimentoj, propedeŭtika valoro

En la propaganda laboro por E-o ni ofte bezonas argumentojn, science pruvitajn faktojn, oficiale aprobitajn rezultojn pri tio, ke valoras, utilas, eĉ profiton donas la lernado de la internacia lingvo. Krom la ĝenerale konataj ĉiutagaj –kvankam plejparte veraj – konvinkaĵoj, ke E-o estas facila, rapide ellernebla, ktp lingvo, pledante por atingi nian celon (ekz. enkondukon de la internacia lingvo en la studprogramon de lernejo) tre utilas scii fontojn, titolojn, adresojn pri la konsulteblaj protokoloj kaj organizantoj. Tiun ĉi bezonon pruvas ankaŭ la ĉiam pli oftaj informpetoj tiurilataj ekz. sur la paĝoj de Internet, en la leteroj, adresitaj al la redakcioj de E-periodaĵoj. Sen klopodi listigi ĉiujn tiajn dokumentojn nia redakcio decidis per la suba resumo helpi la orientiĝon de niaj kolegoj. Se iu nuntempa eksperimento mankas, ni petas la organizantojn informi la redakcion kaj kompletigi niajn liston.

1. Nuntempaj projektoj kaj eksperimentoj

1.1. TALENTO-lernejo, Hungario

La celo de la fonduso, lanĉita en 1989, estis pruvi, ke inter bone organizitaj kondiĉoj, pere de specialaj instruprogramoj el averaĝaj infanoj oni povas eduki talentajn infanojn, kies inteligenteco superas tiun de la samaĝuloj. La lernejo komence funkciis kadre de ordinara ŝtata lernejo – poste memstariĝinta –, specialiĝis pri la instruado de matematiko kaj fremdaj lingvoj el kiuj la unua, enkonduka estis E-o, kies instruado disvolviĝis helpe de eksterlandaj, denaske esperantistaj instruistoj. La sukcesa alproprigo de tiu ĉi lingvo donis eblon lerni matematikon pere de sorobano rekte de japana instruistino, alkutimiĝi al la komunikado en ne-nacia lingvo, kadre

de alia lingvosistemo. La propedeŭtika valoro de E-o montriĝis tre klare, ja la instruadon de la internacia lingvo sekvis tiu de la franca, kun bona sukceso.

La organizantoj dediĉis multe da energio por la enlanda kaj eksterlanda ekkonigo de la projekto, aperis multaj eldonaĵoj kaj artikoloj pri la lernejo kaj la infanoj vojaĝis eksterlanden parte por partopreni sciencajn konferencojn pri la talento-esplorado, parte kadre de internaciaj kunlaboroj. La evoluo de la projekto estas bone dokumentita, protokoloj kaj surbendigitaj filmoj gardas la fazojn de la valora laboro. Bedaŭrinde la fonduso havas financajn problemojn kaj ne plu eblas lanĉi novajn TALENTO-klasojn.

Artikolo: (proponata el la multaj) Esperanto, 1994/aprilo, p. 65-66.

Kontaktadreso: András Lukács, HU-2040 Budaörs, Szivárvány u. 4/36. (+36 23)-420 770, retpoŝto: levego@levego.zpok.hu

1.2. EKPAROLI (Esperanto Kiel Propedeŭtiko Al Rapidigo de Orientazia-Lingvo-Instruado), Aŭstralio

En la pli ol 100-lingva Aŭstralio kaŭzas verajn problemojn la plurlingveco. Krom la plej grandaj eŭropaj lingvoj, kiujn oni grandskale instruas tiulande, havas grandan rolon ankaŭ la orient-aziaj lingvoj. La celo de la projekto estas pruvi la propedeŭtikan valoron de la internacia lingvo al la lernado de la aziaj lingvoj. Post la propaganda laboro en 1995 komenciĝis la trejnado de E-instruistoj, kiuj post mallongadaŭra (!) lernado komencis praktiki la lingvon, instruante ĝin en la lernejoj. La materialo per kiu ili laboras estas la Mazi-kompleto, kiun la organizantoj riĉigis per memfarita ekzercomaterialo. La projekto disvolviĝas en 2-4 lernejoj, estas helpata de la prestiĝa Monash universitato de Melburno, kie fondiĝis aparta sekcieto por tiu ĉi eksperimento.

Artikolo: IPR/95/2 p.15-16; Esperanto/1996/majo p.92.

Kontaktadreso: Alan kaj Jennifer Bishop, Fakultato Eduka, Universitato Monash, Melbourne, Victoria 3168, Aŭstralio,

retpoŝto: esperanto@Education.monash.edu.au

1.3. ESP² - instruika eksperimento, Italio

La celo de la eksperimento estas pruvi, ke la lernado de la internacia lingvo plibonigas ĉe italoj la teorian priskribkapablon koncerne la gepatran lingvon, ebligas ĉe la lernantoj la konsciiĝon pri la lingvaj modeloj, helpas alproprigi metalingvajn kapablojn, pruvas la propedeŭtikan valoron de E-o.

La programo disvolviĝas en la Tria Universitato de Romo, en la Laborejo pri eksperimenta Instruiko. La praktikan pruvon de la teorion science pruvita hipotezo la gvidanta teamo modele organizas. En la lernojaro 1995-96 komenciĝis la trejnado de la instruistoj, plejparte en malĉeesta formo de la instruado de E-o kaj ties kulturo al 50 kandidatoj. La preparita instrumaterialo estas tre valora kaj modela bazo por tiucela trejnado. Post dujara formado la 30 sukcesintoj komencos en aŭtuno de 1997 la instruadon de E-o en siaj lernejoj. Esperiga kaj science bone protokolata eksperimento.

Artikoloj: IPR/1995/2. p.13-15.; Esperanto 1995/majo p.85.
Kontaktadreso: Mauro La Torre, Terza Università di Roma, via del Castro Pretorio, 20, IT-00185 Roma, Italio. Retpoŝto: m.latorre@educ.uniroma3.it

1.4. Internacia eksperimento - INTER-KULTURO - Slovenio

La trilanda (Slovenio, Kroatio kaj Aŭstrio) eksperimento laŭ la paderborna modelo celas pruvi la rolon de E-o kiel modellingvo por lerni fremdajn lingvojn. Laŭ la tezo la lernantoj kiuj unue lernas 70 lernohorojn E-on poste pli rapide kaj sukcese lernos la anglan aŭ germanan, do la investita tempo estos regajnita. La projekto estas subtenata de la Ministerio de Scienco de Slovenio kaj de la Pedagogia Fakultato de la Maribora Universitato. La eksperimenton partoprenis 6 klasoj el tri landoj inter 1993-95. Post la instruado (inter diversaj kondiĉoj, parte de diversaj instruistoj) fariĝis detala matematika analizo de la rezultoj, surbaze de science prilaboritaj lingvaj testoj en la angla kaj germana lingvoj. La hipotezo pruviĝis, sed por science konfirmi la rezulton necesas eksperimento kun pli granda nombro de partoprenantoj, kun pli favoraj kondiĉoj. La gvidanto akiris bonajn spertojn, utiligeblajn dum aliaj ekzamenojn.
Artikolo: Eventoj/1995/junio1. p.5; IPR 1996/2. p.25.
Kontaktadreso: INTER-KULTURO, Zlatko Tišljar, Besednjakova 1, SL-62000 Maribor, Slovenio, Tel/fakso: +386-62-100669

1.5.1. FUNDAPAX-Italio

En 1994 Esperanto-Radikala Asocio, ligita al la transnacia Radikala Partio akiris 26.000 dolaran subvencion de Unesko por sia dujara projekto, kies celo estis helpe de amaskomunikiloj kaj komputila reto informi pri la internacia lingvo, kontaktigi infanojn de 4-16 unuagradaj lernejoj el pluraj landoj, interkomunikantaj pere de E-o; starigi reton de "Fundapax-instruistoj". La projekto entreprenis nur la interkonigon de la interesatoj, ne ilian trejnadon. Sub ĝia aŭspico eldoniĝis lernolibro de Elizabetta Formaggio: *Ludu kun ni*, taŭga kaj proponita por la internacia uzo de la kontaktiĝintaj lernejoj; eldoniĝis ankaŭ manlibro por helpi la laboron de la instruistoj. Dum la propaganda fazo estis dissenditaj informleteroj pri E-o, foje ekzemple 16.000 ekzempleroj al pli ol 100 landoj.

Anstataŭ la celitaj 16 lernejoj estis kontaktitaj 105 lernejoj el 29 landoj, kaj la lernolibro eniris la movadan merkaton. Nuntempe E.R.A. ne plu okupiĝas pri la kontaktitaj lernejoj.

La dujara (1994-1995) projekto finiĝis kun sukceso, ĝi plenumis siajn celojn, mankas nur la publikigo de la promesita protokola "blanka libro".
Artikoloj: IPR/1994/1-2. p.43; Esperanto 1994/majo p.82-83,
Eventoj 96/marto 2, p. 6..
Kontaktadreso: E:R:A: Via di Torre Argentina 76, IT-00186 Roma, Italio, Fakso: (+39-6) 68-80-53-96, retadreso: E:R:A@agora.stm.it

1.5.2. Lernejo Gaetano Salvemini en Torino (Italio) inter 1989 kaj 1994 propedeŭtikcele gvidis eksperimenton aprobitan de la Ministerio por la Publika Instruado. La laboro en tiu ĉi lernejo havas multajn rilatojn kun la projekto FUNDAPAX, estis ties antaŭhistorio kaj grundo por ĝia agado. Detalan priskribon pri la laboro kaj ties fazoj vi trovas en IPR/94/3. p. 21-32.

1.5.3. FUNDAPAX 2 okupiĝas pri la kolektado kaj aktualigo de la adresoj de la kontaktiĝemaj elementaj lernejoj. La aktivuloj ne volas, ke la komencita laboro de E.R.A. Ĉesu kaj entreprenis la zorgadon de la adresaro.
Kontaktadresoj: 1) Kent JONES, 5048 N. Marine, D6, Chicago, IL 60640, Usono.
Retadreso: 102252.3271@compuserve.com,
2) Bern Wheel, retadreso: bernwheel@aol.com

2. Malnovaj eksperimentoj, valoraj dokumentoj

2.1. Por pruvi la propedeŭtikan valoron de E-o okazis jam eksperimentoj komence de la dudeka jarcento, sed aludo al ties ekzisto kaj rezultoj nuntempe ne tre helpas.

La eksperimentoj de la sepdekaj jaroj estas pli imponaj kaj pro ilia bona protokolado povas doni bonan helpon dum pledo por la internacia lingvo.
Pri la tiutempaj strebadoj kaj Trijara Pedagogia-Didaktika Eksperimento (PDE), disvolviĝinta en 1971-1972 kun 800 lernantoj en 30 lernejoj de Aŭstrio, Bulgario, Hungario, Italio, Jugoslavio; kaj pri la dua regiono de PDE, eksperimento kun la partopreno de lernejoj el Nederlando, Germanio Fed. Resp., Belgio kaj Francio en 1973-1974 troveblas informoj interalie en la sekvaj eldonaĵoj:
Sonnabend, H.: Esperanto: lerneja eksperimento, raporto, analizo, konkludo. In kajeroj de IPR. - Edistudio, 1979.
Szerdahelyi, I.: Kvinlanda pedagogia eksperimento por oficiala enkonduko de Esperanto en lernejojn. - En: Internacia Pedagogia Revuo, 1971- 1. Nürnberg, 1971.
Szerdahelyi, I.: Metodologio de Esperanto, Tankönyvkiadó, Budapest, 1981. p. 309-342.

2.2. En **Paderborno, Germanio** estas la lulilo de multaj eksperimentoj ekde la sepdekaj jaroj ĝis la nuna epoko. Laŭ la tiel nomata **Paderborna modelo**, la metodologio de kibernetika pedagogio de prof. Helmar Frank pri la Lingvo-orientiga instruado (LOI) disvolviĝis multaj eksperimentoj, kies rezultoj estas bone dokumentitaj, publikigitaj interalie en la eldonaĵoj de Kybernetische Pädagogik kaj en la publikaĵoj de Helmar Frank.
Kontaktadreso: D-ro Helmar Frank, Kleinenberg Weg 16A, DE 33 100 Paderborn, Germanio

3. Ĝeneralaj informoj pri la atingeblaj fakliteraturo kaj artikoloj

Ĉi tiu artikolo ne povas profunde analizi la temon, do necesas ekipi nin ne nur per konkretaj faktoj kaj datumoj, sed ankaŭ per teorio.

3.1. Symoens, E.: Al nova internacia lingvopolitiko: La propedeŭtika valoro de Esperanto. Esperanto-Dokumento 28-29 E., Rotterdam: UEA, 1992.
La verko kaj ties plurlingva traduko donas la plej bonan trarigardon pri la menciita temo kaj en ĝi troveblas **tre bona bibliografio** pri la koncerna literaturo, priskriboj kaj referencoj ankaŭ pri la supre menciitaj eksperimentoj.

3.2. Symoens, E.: Bibliografio de disertacioj pri Esperanto kaj interlingvistiko, UEA, Rotterdamo, 1989. La libro donas trarigardon pri la sciencaj verkoj pri E-o, akceptitaj en universitatoj kaj altlernejoj ĝis la jaro 1988. En la listo troveblas multaj verkoj, koncernaj la propedeŭtikan valoron kaj instruadon de la internacia lingvo. Bedaŭrinde pri la postaj disertaĵoj ne aperis ĝis nun suplemento, kvankam bonŝance ekzistas tiaj studoj.

3.3. ILEI en 1995 decidis sian konferencon al la temo: Propedeŭtika valoro de Esperanto. Por tiu ĉi evento en la numero **IPR/95/2** aperis pluraj artikoloj koncerne la temon.

GABRIELLA HORVÁTH:

Analizado de la periodaĵo IPR... (1970-1995)

(Tria, lasta parto)

PRI LA ENHAVO

Nun mi volas resumi, kiel efektiviĝis la celoj kaj konceptoj de la redaktoroj .

La revuo startis kiel pedagogia forumo, per kies helpo la instruistoj povos diskuti pri diversaj pedagogiaj kaj metodologiaj problemoj. Apud teoriaj artikoloj ricevis lokon ankaŭ opinioj de la legantoj, ILEI-aferoj kaj informoj el la pedagogia vivo. La revuo havis plie teorian karakteron, kaj ĝi funkciis kiel pedagogia-metodika fakrevuo.

Post la komencaj malfacilaĵoj la revuo reaperis en 1973, kaj la nova redaktoro, Reinhard HAUPENTHAL volis kompili koheran pedagogian gazeton, kies numeroj estu dediĉataj al po unu temo. (Jam Helmut SONNABEND planis tion en 71/1, sed la revuo ne aperis regule, li ne ricevis sufiĉan kontribuaĵon por tiu ĉi celo, do li ne povis efektivigi sian planon). Fakte ĝis 74/3 ĉiu numero de la revuo havis difinitan temon, aperantan en la gvida artikolo aŭ en pluraj diversaspektaj skribaĵoj. R. HAUPENTHAL vortumis tiujn pensojn, kiuj estis fundamentaj pretendoj dum la tuta historio de la revuo. Unuflanke la konvena proporcio inter teorio kaj praktiko en la artikoloj, aliflanke la apero de la ĝeneralaj pedagogiaj kaj E-instruaj problemoj. Lia tria vidpunkto estis, ke IPR servu kiel refera organo pri informoj de la pedagogia vivo (inkluzive libro-proponoj, recenzoj). HAUPENTHAL provis redakti revuon konvenan al tiuj ĉi celoj: post la pedagogiaj artikoloj staris recenzoj kaj informoj. Sed post tri kajeroj li abdikis kaj ne plu okupiĝis pri ĝia redaktado.

Ekde 75/1 la artikoloj de la revuo ne grupiĝis ĉirkaŭ unu difinita temo. Kelkaj

numeroj entenas unu longan, funde prilaboritan artikolon (kvazaŭ gvidan temon; ekz.: 77/2 p.25.; 77/3 p.49.; 78/1 p.49.; 79/2 p.45.; 80/1 p.3.), sed aliloke plurajn, diverstemajn skribaĵojn (79/1; 79/3; 80/2). Ŝajnas al mi, ke multfoje la aspekton de la revuo determinis, el kiuj materialoj povis elekti la redaktoro (pledas por ĉi tio, ke la redaktoroj ofte plendis pri la manko de kontribuaĵoj; ekz.: 70/1 p.3.; 83/1 p.2.; 95/2 p.36.).

Kion oni povas diri pri la ekvilibro de la teorio kaj la praktiko de la E-instruaj kaj aliaj studobjektoj en la revuo? Ĉi tiu imago de R. HAUPENTHAL ne efektiviĝis ĝis la 1986-aj numeroj (kaj ankaŭ tiam nur parte: la plimulto de la artikoloj temas ne pri praktikaj helpiloj kaj pri la instruado de aliaj studobjektoj). Ni apenaŭ povas trovi artikolojn pri aliaj studobjektoj (escepte en 76/3 p.64.; 77/3 p.68.; 80/2 p.30.), se jes, tiam pri lingvoinstruado ĝenerale (75/1 p.5.; 79/2 p.44.; 82/1 p.3.; 83/1 p.11.; 85/2 p.29.). Pri praktikaj, instruhelpaj konsiloj ni povas legi nur en la jenaj numeroj:77/3p.49.;81/1p.13.; 81/3 p.81.; 82/2 p29.; 83/1 p.4.

Miaopinie en la periodo 75/1- 85/3 la revuo ne funkciis bone kiel refera organo pri gravaj pedagogiaj informoj. Ĝi ne havas ekzemple artikolojn pri libroj, recenzoj, libro-proponoj; nur sporade ni trovas kelkajn (71/2; 74/1 kaj 2; 76/2; 79/1 kaj 3; 82/2; 84/2). Ĝi ĝenerale entenas nur kelkajn informojn pri aranĝoj, kaj ili koncernas precipe ILEI-konferencojn, protokolojn pri estrar-kunsidoj de ILEI, aŭ rezoluciojn kaj statut-proponojn de ILEI. La redaktoro konsideris la ILEI-aferojn tiom gravaj, ke multfoje li renversis la tradician vicordon (pedagogiaj, metodologiaj kaj alitemaj artikoloj; poste informoj) de la rubrikoj: (ekz.: 84/1 kaj 3; 85/2; 75/2; 76/2). Sed okazis, ke en kelkaj kajeroj ne estis pedagogiaj verkoj (nur raportoj pri konferencaj prelegoj - 80/3; 81/2; 84/2; 85/1). Proksimiĝinte al la fino de tiu ĉi periodo, ni povas renkonti pli multe da informoj. Eble ankaŭ Hans FECHLER (85/1 p.2-4.) sentis la mankojn, kiam li skribis sian leteron al la redaktoro, proponinte multajn novajn temojn kaj rubrikojn. Inter aliaj:

- kompari instrumetodojn kaj instruobjektojn
- informi pri eksperimentaj lernejoj, pri problemoj
- informi pri instrusistemoj diverslandaj
- informi pri la edukado de instruistoj
- represi valorajn pedagogiajn artikolojn, elprenitajn el aliaj E-gazetoj
- prezento kaj recenzo de libroj
- informoj de landaj sekcioj
- proponoj por feriaj interŝanĝoj inter E-parolantaj pedagogoj ktp.

La jus menciitaj vidpunktoj estis utiligitaj en la sekvaj kajeroj, ja ekiĝis novaj rubrikoj: "*Aktualajoj*" en 86/2; "*Leterkesto*" en 88/1; "*El la landoj kaj sekcioj*" en 85/1. La periodo 86/1-95/4 montras novan redaktan koncepton. La revuo prezentas fakajn artikolojn kaj pli da praktikaj, metodologiaj helpiloj (ekde 86/3 ni povas trovi preskaŭ en ĉiu numero). Mi jam menciis, ke estis inter la imagoj de KOVÁCS Márta, ke la

revuo publikigu artikolojn pri diversaj studobjektoj; sed aperis nur du kontribuaĵoj pri tio en la numeroj 92/3 kaj 93/3. En tiu ĉi periodo IPR havis pli multe da informoj, kio estas unuflanke bona, ĉar la legantoj povas informiĝi pri ĉiuj - en Esperantujo okazintaj - aferoj; sed nuntempe la revuo fariĝas pli kaj pli informilo, kaj ĝi malpli funkcias kiel pedagogia-metodika fakrevuo. Ekstrema okazo: la numeroj 94/4 kaj 95/3 konsistas nur el informoj, novaĵoj, aktualaĵoj. La revuo nun pretiĝas laŭ kohera koncepto en tiu senco, ke la redaktoro preferas la artikolojn kun praktikaj konsiloj, instruhelpiloj, li aperigas konstantajn rubrikojn kaj multe da informoj. La konstantaj rubrikoj, la reagoj pri pli frue aperintaj artikoloj, la daŭrigoj de la skribaĵoj kunigas la unuopajn kajerojn, sed la artikoloj ne grupiĝas ĉirkaŭ gvida temo (nur en 95/2). Interesa problemo estas la originaleco de la kontribuaĵoj. En 1973 (Varbnumero) R. HAUPENTHAL vortumis tiel, ke la revuo publikigu laŭeble originalajn artikolojn. Sed H. SONNABEND estis devigita (83/1 p.1-3.) aperigi verkojn, transprenitajn el diversaj E-lingvaj gazetoj, ĉar li ne ricevis originalaĵojn por publikigo. Li ne volonte faris tion. Interese, ke nuntempe multaj homoj (ekz.: KURUCZ Géza 94/4 p.31.) apogis la transprenadon de diverslingvaj artikoloj, kiuj raportas pri la plej novaj pedagogiaj kaj metodologiaj novaĵoj; tiel la revuo povas certigi, ke la legantoj ricevu multflankan trarigardon pri la pedagogia vivo. Ankaŭ NÉMETH József pensas tiel (95/2 p.36.), li transprenas mankantajn pedagogiajn informojn el aliaj gazetoj.

DEMANDOJ - RE(T)SPONDOJ

*(NdlR - Estas kelkaj landoj, kiuj malofte rolas en la rubriko "*El la landoj kaj sekcioj*". Lastatempe mi dissendis plurajn mesaĝojn rete kaj helikpoŝte petante informojn pri la instruado de E-o kaj pri retadreso de instruistoj en diversaj landoj. Jen la aktuala rezulto. La respondoj ne donas kompletan superrigardon, tamen ili enhavas valorajn informojn. Mi atendas viajn kompletigojn kaj eventualajn korektojn. - Escepte Ĉeĥion kaj Jugoslavion, ĉiuj informoj venis rete.)*

Ĉeĥio

En nia lando E-o ne estas instruata en lernejoj, nur tie, kie troviĝas entuziasmaj e-istoj. Mi ekzemple scias pri nur du infanaj kluboj: ili estas en Česká Třebová kaj en Trutnov. Ĉi-jare oni planas malfermi infanan klubon en Svitavy. Infanoj el Česká Třebová jam sukcesis ĉeesti E-programojn en Francio kaj Germanio. [...]

En nia klubo estas alia la situacio. Ni estas klubo de plenkreskuloj, kiuj kunvenadas ĉiumerkrede je la 18-a horo en stacidoma klubejo en Přerov. Kursoj okazadas neregule, fakte por nur 5 personoj. Kialoj estas diversaj [...]

Dum la ĉi-jara internacia kongreso de esperantistoj handikapuloj okazos ankaŭ ekzamenoj de Esperanto.

En nia lando ne estas bone funkcianta sekcio por e-istaj instruistoj kaj mi scias, ke

la prezidanto s-ro Malovec el Brno dissendis al ĉiuj, pri kiuj li sciis, informon pri nova kreo de la sekcio de ILEI. Mi volis aliĝi kaj dum la 81-a UK en Prago mi partoprenis kunvenon de ILEI, sed pro tio, kion mi aŭdis tie, mi seniluziiĝis. Tenura prononco de instruistoj de E-o ne estas bona ekzemplo. Mia opinio estas, ke unue mi devas ion scii kaj poste instrui kaj ne angle aŭ ruse prononci belegan E-on.

Libuse Filipová,
Nádražní 146, CZ-768 11 Chropyně, Ĉeĥio

Honkongo

Al via demando mi respondas, ke fakte estas nur mi, kiu instruas en Honkongo. Mian retadreson vi konas, sed mi bedaŭrinde translokiĝos al Svislando post duona jaro. Espereble daŭrigos kursojn s-ro Bill Mak (sen retadreso), sed tio ankoraŭ ne certas. Mi estas pedagogo, li estas lingvisto.

Werner Breitung,
Honkonga Esperanto-Asocio

Israelo

El la E-instruantoj kiujn mi konas en Israelo neniu havas retadreson. Estas junulo kiu eble venontjare instruos kurson, kiu supozeble havas retadreson.
Okazas E-kurso kiel oficiala fako en la Teĥnion - la politeknika universitato.
Foje okazas etaj kursoj en la tri ĉefaj urboj. Koresponda kurso tutlanda - sed lastatempe preskaŭ sen studantoj.

Amri Wandel

Japanio

Mi gvidas kurson ĉe Nishinippori E-klubo 1-foje en monato, ĉiam en la unua mardo ekde 10:30 ĝis 12:00. Ĉiuj ok gekursanoj estas plenaĝuloj kun meznivela lingvoscio. Dum la kurso ni legas fabelojn el tuta mondo (komence japanajn, nun francajn), kiuj interesigas la kursanojn. Ekde aprilo mi instruos E-on 3-foje en monato kaj nun mi pripensas: kion mi faru dum la kurso, kiumaniere mi gvidu ilin por ke la kurso estu interesa. Krom la fabeloj mi intencas prezenti mallongajn rakontojn aŭ novelojn.

Wienczyslawa Pacwa Sato, Tokio

Kiel kutime ankaŭ en 1996 mi instruis en multaj kluboj en kaj ĉirkaŭ Tokio. La lecionoj okazis regule en 5 kluboj kaj de-tempo-al-tempe en 3 aliaj. Entute mi gvidis ĉirkaŭ 130 lecionojn de elementaj ĝis progresantaj. Averaĝa aĝo de miaj lernantoj en Lunda Klaso (ĉiun lundon en JEI) estas pli ol 60 (la plej aĝa 86 jara) kaj en Sengendai E-klubo ĝi estas iom pli ol 20. Mi regule havis lecionojn en unu el la plej internaciaj E-kluboj en la mondo (en senco de nacieco de la instruistoj). Temas pri Nishinippori E-klubo (en la centro de Tokio kaj kun kursoj en 4 niveloj kaj 35 membroj), kies instruistoj estas el 5 diversaj naciecoj!
Komence de la jaro mi fondis E-klubon en mia nova loĝurbo, kaj fine de la jaro fondiĝis konversacia rondo en mia laborejo por e-istoj kun mezgrada lingvoscio.

RezaKheirkhah, *C.O.P.Tokyo,*
Box No. 405, 100-91 Japanio. tel+fakso: 03-38333490, yumeiho@majic.co.jp

Jugoslavio

En nia regiono, norda Bačka, parto de Vojvodino, ne estas organizita E-instruado en la lernejoj. Nia E-societo regule organizadas kursojn por komencantoj kaj dum niaj E-renkontiĝoj "*Verdaj amikaj tagoj*" ni organizas "A" ekzamenojn. Nun en nia E-societo estas du kursoj - por komencantoj (4 personoj) kaj konversacia (12 personoj).

Por komencantaj kursoj baza literaturo estas la legolibro de Antonije Sekelj kaj por konversacia "*Pašoj al plena posedo*" de William Auld kaj "*Esperanto laŭ amuz-metodo*", la legolibro kun paroligaj ekzercoj de Andrzej Pettyn.

Dum ĉi-jara E-renkontiĝo "*Verdaj amikaj tagoj*", kiun ni organizos de la 13-a ĝis la 15-a de junio, ni planas organizi "A" kaj "B" ekzamenojn.

***Siniša Veličković**, prezidanto de Esperanto Societo en Senta, YU-24400 Senta, N. Martinoviča 3.*

Kanado

Mi scias certe nur pri du rete kontakteblaj homoj, kiuj instruis E-on en nia lando dum la pasinta duonjaro. Unu el ili estas mi, kiu instruadas ret-poŝte per baza kaj meznivela kursoj - pli frue mi instruis ankaŭ en surlokaj kursoj. Alia E-instruanto en Kanado estas Sylvain Auclair <silvano@cam.org>, kiu regule gvidas E-kursojn en Montrealo. Aliaj rete atingeblaj kanadaj e-istoj, kiuj iam instruis E-on estas

- Maria Hopkins (loke) [mia edzino - ĉe mia adreso]
- Wally du Temple (loke) <dutemple@mail.IslandNet.com>
- Jean Smythe (koresponde) <jesmythe@island.net>
- Eduardo Vivancos (koresponde) <vivancos@pathcom.com>
- Ken Price (rete) <ken.price@westonia.com>
- Guy Matte (rete) <71161.1532@Compuserve.com>
- Yves Bellefeuille <an448@freenet.carleton.ca>
- Ian McKenzie Richmond (loke) <richmond@marina.istar.ca>

(Mi instruas universitate, Auclair instruis mezlerneje, mia edzino diplomiĝis kiel E-pedagogo en Pollando, Matte kaj du Temple estas mezlernejaj instruistoj, Richmond estas universitata profesoro, la aliaj estas amatoraj instruantoj)

Nuntempe estas malmulte da surloka instruado de E-o en Kanado: dum la pasinta vintro mi aŭdis nur pri kurso por studentoj de universitato McGill (en Montrealo), kiun gvidis s-ano Auclair pasintan aŭtunon, kaj mi scias ke f-ino Kim Keeble instruas E-on al infanoj de bazlernejo en la vilaĝo Upper Rawdon en centra Novskotio.

La Kanada E-Asocio ofertas instruadon de E-o per dek-leciona kurseto simila al tiu uzata rete - estas nun nur tri instruantoj pri kiuj mi scias (Kim Keeble, Eduardo Vivancos kaj Myra Larsen) - kaj por la duaj du ŝtupoj de la kursaro de ELNA - la ĉefa instruanto estas Jean Smythe. Ankaŭ la E-Societo Kebekia instruis per franclingva versio de la dek-leciona kurseto, sed mi ne sciás ĝis kiu grado ĝi plu estas uzata.

La retaj kursoj montriĝis efikaj instruiloj en nia lando: dum la pasintaj ses jaroj

mi instruis E-on al almenaŭ 40 kanadanoj per la dek-leciona anglalingva ret-kurso kaj al 10 kanadanoj per la meznivela kurso (tiu kiu baziĝas je la novelo "*Gerda Malaperis*" de Claude Piron); ankaŭ Ken Price kaj Yves Bellefeuille instruis iom per la anglalingva retkurseto kaj Guy Matte instruis per la franclingva retkurseto (kies bazon mi provizis entajpante la dek-lecionan kurseton de la E-Societo Kebekia).

***Paul Hopkins** <phopkins@uvic.ca>*
Linguistics Department, University of Victoria, P. O. Box 3045, Victoria, BC, Canada V8W 3P4, Phone (home): (250) 474-3137, Fax (office): (250) 721-7423

Meksiko

Laŭ mia scio, la E-kursoj en Meksiko estas spontaneaj, neniom aŭ malmulte ligitaj al lernejoj. Grava escepto estas (estis?) unu kurso en Oaxaca [*waĥaka*], en la sudo de la lando, kie gimnazio inkluzivis E-on kiel laŭvolan kurson en sia programo. Oni povus taksi escepto ankaŭ la kursojn ĉe la Societo de Amikeco Meksiko-Ĉinio (Meksikurbo), iom pli planataj, same kiel tiujn ĉe la E-Informo-Centro (de E-Meksika Junularo, en Nawkalpan, norde de la ĉefurbo). Foje oni aŭdas pri kursoj en Chihuahua [*ĉiwawa*, en la nordo], Durango kaj aliaj urboj. La eta E-lingva komunumo Krucio, meze de l' dezerto en Malsupra Kalifornio, iusence estas E-lernejo.

Meksika E-Federacio ne havas apartan adresaron de E-instruistoj, sed oni povus facile kompili ĝin el la ĝenerala membrolisto, kiu foje enhavas tiajn donitajojn.

Ĉiu instruanto uzas la lernilojn plej facile atingeblajn. Plej ofte mi vidis la kolegojn uzi la dudirektan poŝvortaron de Paluzie-Borrell kaj la kurson *¿Habla Usted Esperanto?* de Ergoto de Bonaero; iom malpli ofte, la kurson *Esperanto para clases y autodidactas*, de Fernando de Diego, kaj la anglalingvan lernilon de la serio *Teach Yourself*.

MEF havas la intencon (revon?) enkonduki E-on en la lingvo-instituto de la Nacia Universitato. Pluraj samideanoj, inter ili mi mem antaŭ kelkaj jaroj, gvidis kursojn tie, neoficiale. Tamen la oficiala enkonduko postulas multe pli ol amatorecon, kaj ni ne havas profesiajn instruistojn.

La sekretario de MEF, s-ro Jorge Luis Gutiérrez, verŝajne scias pli ol mi pri la nuna situacio de la E-instruado en Meksiko.

Juan Jacobo

Norvegio

Bedaŭrinde okazas malmulta instruado en Norvegio nuntempe, kaj temas precipe pri gastinstruistoj, nome Atiljo kaj Katalin. Kursoj okazis last/ĉi-jare en la kluboj de Oslo <esp.oslo@sn.no>, Trondheim (Knut Lyngstad <knutly@stud. ntnu.no>), Bergen (Jon Arne Holm <jaholm@online.no>) kaj Tromsø (la prezidinto estas Herolv Olsen <herolv@lagopus.nordlys.no>; la prezidanto Marianne Lund ankoraŭ ne havas retadreson).

Knut Lyngstad aktivas en la sekcio de NEL pri informado. Instruado okazas nur kadre de la kluboj nuntempe (krom foje en Bergen kadre de kleriga asocio).

***Douglas Draper**, sek. NEL kaj red. N.E-isto*

Nov-Zelando

Malmultaj E-instruistoj troviĝas en Nov-Zelando kaj neniu el ili utiligas la reton. Nuntempe neniu instruas E-on en lernejoj, laŭ mia scio. Brian Fox antaŭe instruis en Auckland, sed li emeritiĝis antaŭ kelkaj jaroj. La klubo en Auckland havas klasojn por novuloj, ĝenerale plenkreskuloj.

Donald Rogers

Landoj kaj sekcioj

Albanio

Vizito de nia sekretario en Albanio

Marija Beloŝeviĉ (M.B.), sekretario de la Kroata Esperantista Unuiĝo kaj ILEI vizitis Albanion inter la 2-a kaj 14-a de marto. Ŝin invitis Albana Esperanto-Ligo kaj Landa sekcio de ILEI. Dum la dusemajna restado estis planitaj pluraj okazaĵoj kaj renkontiĝoj kun ŝtataj oficistoj. Bedaŭrinde, parte ili ne realiĝis pro la aktuala politika stato.

Tamen ŝi vizitis la Ministerion pri Klerigado, kie ŝin akceptis la ĉef-inspektorino pri la instruado de la lingvoj en albanaj. Ŝi interesiĝis pri la E-instruado en aliaj landoj, ĉar ŝi estas bone informita pri la enlanda E-instruado.

Ŝi aparte ĝojis ekscii, ke la albanaj instruantoj jus donace ricevis "*Mazi*" videokurson kun akompanaj materialoj. M.B. dankis al ŝi en la nomo de ILEI pro la subteno al la landa ILEI sekcio.

La planita ekzamensesio (de UEA/ILEI) okazis en Tirana, inter tre malfacilaj kondiĉoj, ĉar lernejoj ne funkciis, kaj oni devis organizi ĉion arigante kandidatojn en prograj loĝejoj. Tamen, pluraj montris tre bonan lingvo- kaj movadkonojn je la elementa kaj meza niveloj.

Pluraj renkontiĝoj estis organizitaj kun la kursgvidantoj, kiuj ricevis kolekton de diversaj didaktikaj materialoj.

En la privata galerio okazis la ekspozicio de la infandesegnaĵoj al kiu kontribuis ĉ. 400 infanoj el 13 landoj, i.a. 6 el Tirano, kiuj ricevis donacojn kaj diplomojn. (Temas pri la ekspozicio kiun Kroata Esperantista Unuiĝo organizis decembre kaj januare en Zagrebo, temo: "*Mia novjara mesaĝo*"). [...]

Krom la renkontiĝo kun e-istoj en la ĉefurbo, M. B. vizitis prezidanton de la Albana E-Ligo, Agim Peraj en Shengjin kaj e-istojn en Shkoder, i.a. tre malsanan Zef Mjeda, honoran membron de UEA.

(M.B.)

Britio

Kelkaj atingoj de ETA (Esperanto Teachers' Association) en 1996

Fragmentoj el (invit)letero de Angela Tellier, sekretario de ETA

– ETA-anoj multe aktivis dum la pasint-jara brita kongreso en Saffron Walden: ili starigis varb-budon kaj ekspoziciis instru-librojn, pretigis kaj disdonis flugfolion, okazigis seminarion pri instruiloj, organizis du informsesiojn pri la ekzamenoj de UEA/ILEI, kunordigis kaj surbendigis partoprenantojn en la internacia konkurso pri modela E-parolo

– ETA kunlaboris kun "*Libra Multimedia*" por aperigi la kompakt-diskon "*Ni vojaĝu*",

– verkis regulajn rubrikojn porkomencantajn en "*La Brita Esperantisto*",

– starigis por-instruistan/antan semajnfinan kurson en Barlaston,

– starigis ret-adreson: eta@esperanto.demon.co.uk,

– regule aperigis "*Esperanto Teacher*"

– per tradukoj kunlaboris en la internacia "*Neighbour*"-projekto,

– subtenis la projekton "*Kviz-Kartaro*". Profito de la eldonaĵo iris al la revuo "*Juna Amiko*",

– sukcese starigis varb-kampanjon por kuraĝigi abonojn al la revuo IPR kaj daŭrigis duoblan rabatitan aliĝon al ET/IPR.

Informis: ***Arnold Pitt**, brita sekciestro de ILEI*

Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire, Britio HR6 8QD.

Tel. +1568 613061

Barlaston '97

La *37-a internacia somerlernejo ĉe Wedgwood Memorial College, Barlaston*, Britujo, okazos inter la 9-a kaj 15-a de aŭgusto, 1997. La Barlaston-somerlernejo estas la plej prestiĝa, la plej renoma kaj la plej ampleksa en Britujo. En 1996 gastprelegis en Barlaston - kun granda sukceso - *Renato Corsetti* (Italujo).

En 1997 gastos en Barlaston *Stefan Maul* — jurnalisto kaj i.a. fondinto de la revuo *Monato*. Mi anticipas same "elektran" somerlernejon kiel en 1996! Same partoprenos, kiel kutime, kaj sen kiuj mi ne povus tiel sukcesigi la somerlernejon:

• *Tim Carr* (kies poemaro baldaŭ eldoniĝos de FEL)

• *Roselyne Edwards* (francdevena, universitata lekciisto pri la franca kaj laŭokaza kontribuanto al *Monato*. Roselyne doktoriĝis pri psikologio)

• *Marjorie Boulton* (kiel enkonduki Marjorie, krom diri, ke ŝi verdigis min antaŭ 12 jaroj dum la sama somerlernejo, pri kiu mi nun respondecas: pro tio estas al mi tiom kara la Barlaston-somerlernejo)

• *Kate Hall* (emerita universitata lekciisto pri la franca; Kate famiĝas en Esperantujo kiel verkinto de la plej mallonga kvinakta tragedio en E-o)

• Kaj *mi*!

ILEI-ekzamenoj: Proponiĝas dum la somerlernejo la mezgrada ekzameno de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

Lastatempe mi decidis, pro la granda laboro kunligita kun la ILEI-ekzamenoj, oferti aŭ la elementan aŭ la mezgradan - sed ne ambaŭ samsesie. Do sekvos en 1998 denove la elementa. ***Paul Gubbins***

Danio

Kunlabore kun Norvega Esperanto-Ligo ni invitis denove Katalin Smidéliusz por instrui ĉe ni. En Norvegio ŝi vizitis la urbojn Trondheim, Hamar kaj Oslo. Plej sukcese ŝi estis en Hamar, kie la eksurbestro treege favoras nian lingvon. Li havas grandan famon kaj reputacion en tiu urbo kaj ne ellasis okazon por atentigi pri E-o. En Oslo kaj en Trondheim venis malpli da lernantoj ol oni antaŭvidis. Sed ili plenŝtopis la horaron por profiti kiel plej eble multe de ŝia restado. En Danio Katalin vizitis Ålborg, Århus kaj Vejle. En Ålborg jam funkcias bona klubo kun fervoraj lernantoj, kiuj espereble baldaŭ kuraĝas la salton en la internacian medion. Ĉe ni, en Århus, estis kelkaj lernantoj de la pasinta jaro. Tiuj, kiuj jam sekvis kurson de Katalin volonte revenis. La kurso por la progresantoj stimulis la intereson de niaj komencintoj. Se temas pri komencontoj, ni estis speciale malbonŝancaj, ĉar la aliĝintoj iom post iom malaliĝis pro diversaj kialoj. Tio ja povas okazi, sed estas tamen domaĝa afero. En Vejle Katalin montris sian metodon al 20 vizitantoj de informvespero en la tica asocio. La komencantoj ja konstatis, ke E-o tamen estas lernebla lingvo. Espereble tiu vespero donis inspiron ankaŭ al tiuj, kiuj uzas E-on jam de multaj jaroj. Kaj espereble tiu informvespero estas ĝermo por nova kurso en Vejle. Unusemajna vizito - kaj tamen tiom da malsamaj spertoj, sukcesetoj kaj rebatoj - sed ŝajne tio estas la plej taŭga vojo: alvoki alilandan instruiston, ĉar la lernantoj ĉiam miras, kiam ili parolas fremdan lingvon ekde la komenco kaj iel povas komuniki kun instruanto, kiu ne kapablas aŭ ne volas paroli ilian lingvon. [...]

***Wolfgang Kirschstein**, reprezentanto de ILEI en Danio*
Hvedebjergvej 30, DK-8220 Brabrand

Finnlando

Resumo de la agadraporto de ELFI, 1997

ELFI (Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj) havas 25 unujarajn kaj 6 dumvivajn membrojn. El ili nur kelkaj estas praktikantaj instruistoj. Dum la jaro 3 membroj eksiĝis kaj 4 novaj aliĝis.

Anstataŭ kunsidoj ni ĉefe intertelefonas, leterumas kaj retumas. La retpoŝta konekto kun la sekretariino de ILEI kaj la redaktoro de IPR estas tre utila kaj precipe apogas la sekciestrinon. La sekretariino kaj la sekciestrino sendis plurajn cirkulerojn kaj leterojn al la membraro dum la jaro. ELFI daŭre agadas kunlabore kun Esperanto-Asocio de Finnlando kaj la lokaj enlandaj kluboj.

Klubaj, asociaj kaj individuaj atingoj interplektiĝas nedisigeble. La sekretariino de ELFI peras *Juna Amiko* kaj la sekciestrino laŭeble kontribuas al la redakcio. Trikvin membroj de ELFI laŭpete gvidas semajnfinajn aŭ aliajn kursetojn, sed ne ĉiuj kursgvidantoj aliĝis al ELFI. Ekzemple 14 senlaboruloj havis kurseton en la urbo Turku.

Nova, finnlingva, elektrona E-ŝlosilo (*Esperantoavain*, komputildisketo kaj suĉeblaj paĝoj en la reto) estis pretigita de ne-ELFI-ano, sed ELFI helpis per konsiloj kaj kontrolado de la teksto. Prezidanto de la E-klubo de Jyväskylä inkluzivis ELFI/ILEI en la hejmpaĝo de EAF, nome < http:www.sci.fi/~matlah/eaf/>. Dum la kongreso NORDLINGUA [*IPR 96/4*] estiĝis kontakto kun la redaktoroj de la senpaga lerneja reto <http.www.freenet.hut.fi>.

Oni povas uzi en la reto Esperanto-ŝlosilon finnlingvan. Ĝi troviĝas en la paĝoj de E-asocio de Finnlando <http://www.sci.fi/~matlah/eaf>. Tiujn oni povas legi Esperante kaj finne, sed la ŝlosilo kompreneble estas nur finnlingva kun Esperantlingvaj ekzemploj.

Ni faris ankaŭ unupaĝan informilon en la lingvoj finna, sveda kaj angla pri ILEI/ELFI kaj distribuis ĝin.

Unu membro sukcesis havi 36-horan kurson de E-o por volontuloj en sia gimnazio. De longa tempo tio estas la unua fojo, kiam E-o estas instruata en finnlanda lernejo. Al la kurso aliĝis 14 lernemuloj. Ili uzas *Mazi*, *Kunvojaĝu* kaj aliajn materialojn.

Menciindas ankaŭ la skolta tendaregо LOISTO, kiun partoprenis dekmilo da skoltoj kaj kien ELFI-ano enkondukis E-on per lecionoj, agadpunkto, stando kaj kunloĝado de E-skoltoj.

ELFI kontribuis al Eŭropa Kalendaro prizorgante ties finnlingvan parton.

Somere la vicprezidanto de ELFI invitis esperantistajn gastojn al sia ekspozicio pri reciklado. Li bonvenigas kontaktojn kaj gastojn al la bieno Agendejo, adreso s-ro Börje Eriksson, Keiturintie, 274, FI-16510 Luhtikylä, Finnlando.

Raita Pyhälä, sekciestro de ILEI en Finnlando *(raita.pyhala@lesti.kpnet.fi)*

E-klubo de Jyväskylä aranĝos someran studsemajnon *Blua Aventuro* 30.6-04.7.1997 en Jyväskylä, Finnlando. Pluajn informojn petu de s-ino Seija Kettunen, Keihäsmichenkatu 3, FIN-40630 Jyväskylä, Tel. (0)14 254 609
matlah@sci.fi, http://www.sci.fi/~matlah/jck/blu-avent.htm

Matti LAHTINEN, Jyväskylä, Finnlando, matlah@sci.fi

Hungario

12-aj Landaj Esperantaj Pedagogiaj Tagoj kaj SOJLO '97
Budapest 01-02.03.1997

La tradician konferencon de la hungara sekcio de ILEI partoprenis pli ol 60 personoj. Jen la prelegoj:

s-ro Péter András Rados: Pedagogiaj utopioj

d-rino Katalin Smidéliusz: 1) Nuntempaj pedagogiaj projektoj
2) Propedeŭtika valoro de Esperanto
s-ro László Szilvási: Organizado kaj reklamado de Esperanto-kursoj
s-ro Géza Kurucz: Kiel konservi kursanojn aŭ kelkaj rimedoj ligi ilin al esperant(ism)o
s-ino Zsuzsa Barcsay: 1) Nacia Baza Lernoprogramo: fremdaj lingvoj - E-o
2) Mallonga prezento pri la kolektaĵo de Károly Fajszy
s-ro Oszkár Princz: Ronda tablo: Kial kaj kiel varbi?
d-ro Balázs Wacha: Lingvo kaj persono

Dum la Pedagogiaj Tagoj la asocio de hungaraj E-instruistoj havis sian asembleon, kie la nova estraro raportis pri sia laboro. Oni decidis enkonduki la membrokategorion "apoganta membro" kaj planas reanigi parton de la iama anaro. Formiĝis laborteamo por verki plurjaran laborplanon kaj instruhelpilojn pri E-instruado konforme al la nova, nacia, baza instruplano.

30-jara Esperanto fako

La E-Fako en la budapeŝta universitato ELTE - kun unujara malfruo - ĉi-jare en aprilo festis sian 30-jaran ekziston. La Fako estiĝis en septembro 1966, lige al la 51-a UK en Budapeŝto, kies sukceso signife kontribuis al la enkonduko de Esperantaj lingvo kaj literaturo, kiel filologia fako en la renoma scienca universitato ELTE.

Konciza historio:

1966-1971: La fako ekas kiel C-fako (apud A- kaj B-fakoj). Profesoro Szerdahelyi verkas la bazajn instruilojn. En 1971 li fariĝas plentempa instruisto.

1971-1983: Szerdahelyi estas fakgvidanto, en 1974 komencas labori kun li Zsuzsa Varga-Haszonits. En 1978 estas organizata interlingvistika konferenco kun la partopreno de ĉ. 50 eksterlandanoj, iom malfrue festante la 10-jariĝon de la fako. En 1983 Szerdahelyi estas nomumita docento - tio pligrandigas lian prestiĝon kaj ankaŭ tiun de la fako.

1983-1987: Ilona Koutny kaj Zsuzsa Varga-Haszonits kune gvidas la fakon. En tiu periodo finiĝas la postgrada instruado de hungaroj - ĝenerale en la tuta universitato.

1990-1995: La strukturo de la universitata instruado aliformiĝas. Ni fariĝas B-fako (C-fakoj jam ne ekzistas). Komenciĝas la instruado de eksterlandanoj.

En 1995 Zs. Varga-Haszonits restas la sola dungito, kaj ŝi fariĝas la gvidanto de la fako. En 1996 estas realigitaj gravaj reformoj en la studplano.

Ĝis nun ĉ. 130-140 studentoj (hungaroj kaj eksterlandanoj) ricevis diplomon de la fako. Pretiĝis ĉ. 50-60 diplom- kaj doktorigaj disertacioj. En 1996/97 studas E-on 30 gestudentoj.

laŭ Zsuzsa Varga-Haszonits (el Eventoj 120)

Magistriĝo pri Esperanto

La 22-an de januaro 1997 ŝtat-magistriĝis pri E-o en la Universitato ELTE en Budapeŝto Tacsok Choe (Koreio), Michele Gregory- Zielinski (Usono), Lidia Tučenko (Litovio) kaj Stephane Dupiń (Francio). Nun estas naŭ diplomitoj, kiuj sekvis la 3-jaran perkorespondan E-kurson por eksterlandanoj, starigitan en 1990. Nova 3-jara sesio startos en septembro 1997. Interesatoj bv. skribi al:

Esperanto-Fako, ELTE, pf. 107, HU-1364 Budapest, Hungario.

"*Lingvokurso 110*" en urbo Pécs

Kvintaga, 25-hora, rektmetoda lingvokurso okazos en urbo Pécs (sud-okcidenta Hungario), inter la 13-a kaj 18-a de julio 1997, tuj antaŭ IJS, gvidata de junaj, profesiaj instruistinoj por komencantoj kaj progresantoj. Aliĝkotizo por la lingvokurso: ĉ. 35 svisaj frankoj, restadkosto por 6 tagoj ĉ. 155 svisaj frankoj.

Informas: *Kultura Centro Esperantista, CP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, EPC, Pf. 117, HU-1582 Budapest kaj HEJ, Pf. 87, HU-1675 Budapest*

Internacia deklamkonkurso honore al *Julio Baghy*

okazos inter la 13-a kaj 15-a de junio 1997 en urbo Pápa, Hungario. La konkurso estos integra parto de internacia junulara festivalo, kiu okazos samtempe en la urbo. Pliaj detalojn petu de la redaktoro de IPR. (J.N.)

Italio

Internaciaj kursoj por komencantoj - 24-31 julio 1997 en Assisi

La kursoj okazos dum la Internacia Junulara Kongreso en urbo kaj ebligos al la lernantoj tujan integriĝon en la esperantistan etoson. La kursojn gvidos spertaj instruistoj laŭ rekta metodoj. Atentu: nepras oficialaj kontaktoj inter la landa sekcio kaj la respondeculo de IEJ pri la kotizo, nombro de kursanoj kaj aliaj kondiĉoj! (Alikaze oni pagos la normalan partoprenkotizon)

Cristina de' Giorgi, Via Luigi Pera 10, IT-56100 Pisa - Italio, chriss@sirius.pisa.it

Telefono: (+39-50) 576638

Kroatio

KEU ĉe infanfoiro

En zagreba foiro, estis organizita 1-a Internacia infana foiro de la 19-a ĝis la 23-a de marto. Ĉe la foiro aperis ankaŭ Kroata Esperantista Unuiĝo per internacia ekspozicio de la infandesegnaĵoj, ekspozicio de E-infanlibroj kaj ekspozicio pri la aktivado de plej junaj membroj de KEU.

Dum lastaj du tagoj oni povis sperti MAZI-videokurson. Lastan tagon de la foiro prezentiĝis junaj E-istinoj per kantoj, deklamoj kaj dancoj.

(laŭ M.B.)

Litovio

La E-klubo en Klaipeda, unu el la plej aktivaj en Litovio, invitis CHOE Taesok, diplomiton ĉe la E-fako de la budapeŝta universitato ELTE kaj organizis intensan paroligan kurson de la 2-a ĝis la 6-a de decembro. La klubo en majo 1996 invitis la konatan bulgaran E-instruiston Marin Bacev por la elementa kurso. Ĝin partoprenis kaj finis kvindeko da klaipedanoj. El ili venis 20 al la paroliga kurso. La fakto, ke aziano gvidas eŭropodevenan lingvon, altiris la atenton de lokaj ĵurnaloj, kiuj aperigis kursanoncon.

Dimanĉe unu tagon antaŭ la kurso, al lingvoj dediĉis sian diskutotemon furore aŭskultata radioprogramo "*La Lunc*", kiu daŭras tri horojn kun muzika intermeto kaj senpera konversacio kun aŭskultantoj kaj fine premias interese-prezentintojn. Do ĉiuj, kiuj scipovis pri iu lingvo, povis telefoni al la studio. La E-kluba prezidanto Arunas Kazalauskas kaj CHOE Taesok kaptis la bonan ŝancon informi pri E-o kaj akcesore pri la korea lingvo. Dum la dekminuta interparolo ili prezentis E-on kaj montris vivan parolatan E-on inter la du nacioj. Prezentiĝis 10 lingvoj kaj tamen la E-teamo ricevis la unuan premion.

La plejparto de la kursanoj partoprenis ĉiujn lecionojn sen interrompo. Simpativeka, interesdemanda kaj alivizaĝa kursgvidanto kontribuis al la sukceso. En Koreio ofte eŭropaj aŭ eksteraziaj esperantistaj vojaĝantoj tuj fariĝas portempa E-instruisto ĉe la asocio aŭ lokaj kluboj, ĉar tiam plimultiĝas la atento de lernantoj. Do la saman efikon povus fari azianoj en Eŭropo. Kompreneble, pli gravas la lingvokono kaj metodiko de kursgvidanto.

Post la lasta leciono okazis la festeno en la nova klubejo 120-kvadratmetra, kiun ŝipofabriko senpage disponigas al la klubo. Ĉiuj kunportis glasojn, kukojn kaj sandviĉojn el sia hejmo. Ili kantadis lernitajn kantojn dum la kurso kaj popolkantojn, kaj amuzis sin per ludoj. Estis tre agrabla etoso. La kluba gvidanto diskrete instigis ilin ankaŭ movadaniĝi kaj invitis ilin al la Zamenhofaj Tagoj kaj la jarfina renkontiĝo de la klubo. La plejparto de la kursanaro estis junuloj. La litova Esperantujo havas promesplenan estontecon, ĉar tiom da junuloj interesiĝas kaj lernas dise en la lando.

Dum iu kurstago okazis aventuro pro la viza afero de la gvidanto. Li kun la kluba prezidanto samtage faris 700 kilometrojn da vojaĝo al Vilniuso kaj reen, kaj ili, survoje prenante petveturantojn, efike informis ilin pri E-o. Iu ne konis E-on, kaj alia opiniis ĝin jam morta. Tamen la reala konversacio en E-o donis al ili konvinkiĝon kaj eĉ lernemon. Do al neesperantistoj tiel valorus interparolado en E-o ankaŭ inter samlandaj esperantistoj.

Choe-Taesok

Norvegio

La revuo *Norvega Esperantisto* en sia unua ĉi-jara numero aperigis trionpaĝan informilon pri ILEI kaj nia revuo IPR. Dankon! - *NdlR*

Pollando

Interlingvistikaj studoj komenciĝos en Poznan

La Universitato de Adam Mickiewicz (UAM, la dua plej granda universitato en Pollando) anoncas 3-jaran eksteran studadon pri interlingvistiko. La unua studjaro startos en la vintra semestro de la studjaro 1997/98 kaj poste ĉiun trian jaron. La internacia kurso okazos en la Lingvistika Instituto, sub la gvido de d-ino Ilona Koutny, kun la subteno de prof. Tadeusz Zgólka. Inter la prelegontoj estas konataj esperantologoj, kiel profesoroj D. Blanke, M. Duc Goninaz, H. Tonkin, T. Tyblewski kaj J. Wells, d-ino K. Smidéliusz, L. Ligeza kaj I. Ertl.

La interlingvistikaj studoj konsistas el enkonduko al ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, el internacia kaj interkultura komunikado, ili traktos planlingvojn kaj detale okupiĝos pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de esperanto. En la tria jaro eblas specialiĝi ankaŭ pri metodiko.

Surloka kurso okazos unufoje dum semestro (lasta semajno de aŭgusto kaj de januaro). La gestudentoj pretigos diplomlaborajon kaj post la fina ekzameno ricevos Atestilon pri Interlingvistikaj Studoj.

Partoprenontoj povas aliĝi el la tuta mondo ĝis la 30-a de julio 1997. Postulo: fino de mezgrada lernejo (kun abiturienta ekzameno aŭ egalvalora) kaj bona scio de e-o. Kotizo por unu semestro: 600 USD (por nepagipovaj landoj speciala tarifo). Antaŭ la universitata kurso okazos unusemajna supergrada kurso, kiun povos partopreni ankaŭ la novaj studentoj pri interlingvistiko.

Por pluaj informoj kaj aliĝiloj kontaktu d-inon I. Koutny:

Lingvistika Instituto de Universitato de Adam Mickiewicz,
ul. Miedzychodzka 3-5. PL-60-371 Poznan. T/F: (+48-61)618-572(sekretariejo).
E: ikoutny@hum.amu.edu.pl

Svedio

Nova kursejo de la svedaj esperantistoj

En februaro 1997 ekfunkciis la nova kursejo de la svedaj esperantistoj kaj oni jam gastigis la unuajn gastojn. Nomata "*Esperantogården Lesjöfors*", ĝi funkcias kiel kursejo kaj konferencejo por E-organizoj, svedaj kaj alilandaj.

Pluraj kursoj kaj aranĝoj estas planataj jam la unuan jaron. Meze de majo okazos en ĝi kaj la proksima Popola domo la jarkongreso de Sveda E-Federacio. Somere la Popolaltlernejo de Karlskoga okazigos en ĝi la jam tradiciajn somerajn kursojn, kiuj ĉi-jare estos dusemajnaj. Pliaj aranĝoj okazos somere kaj aŭtune. Por neesperantistaj vizitantoj estas preparita luksaspekta ekspozicio pri E-o, konstante montrata. [...]

La kursejo havas propran informejon en Interreto je la adreso *http://www.esperanto.se/egarden/*. Tie aperos la aktualaj programoj, priskribo pri atingeblo kaj aliaj interesaj informoj.

Svislando

Eroj el la 45-a sesio de la Internacia Buroo pri Edukado (BIE/UNESCO), Ĝenevo, 30.9-4.10.1996.

"Ekzistas nur unu pedagogio... la pedagogio de la amo."
(Federico Mayor, UNESCO ĝenerala direktoro)

"Por la lernantoj la instruisto estas kiel pluvo sur kampo."
(Zaira, 11-jara, Meksikio, el la libro de UNESCO "Kio estas bona instruisto?")

"Instruisto, kiu ĉesas lerni, devas ankaŭ ĉesi instrui."
(proverbo el Kamerunio)

"Neniu lerneja sistemo valoras pli ol valoras la instruistaro."
(citaĵo de la delegito de Bangladeŝo)

"Regas malagrabla sento pro la fakto, ke la socio atendas ĉiam pli de la geinstruistoj, dum la influo de la geinstruistoj sur la socio malkreskas."
(citaĵo de la delegito de Maldivoj)

Kompilis ***Mireille Grosjean****, partoprenintoj de la sesio*

Nora Csiszár (Hungario), Sabine Trenner (Germanio)

Spertoj de internacia infana interŝanĝo

- dua parto *[la unuan parton vd. en IPR 97/1]*

La dua gelernanta renkontiĝo de hungaraj kaj germanaj infanoj okazis de la 4a ĝis 11a de oktobro 1996 en Brandenburgio (Germanio). La temo nomiĝis, kiel ĉe la unua aranĝo, "kulturo kaj tradicio". Ĝin partoprenis dek infanoj el Gyál (Hungario) kaj ok el la landregiono Brandenburgio/Berlino.

La tempon inter la du renkontiĝoj kelkaj el la infanoj uzis por aktiva translima korespondado.

Por la hungaraj infanoj (kaj siaj gepatroj) veturi eksterlanden estis pli granda, pli nekutima aventuro, ol por la germanaj.

Nia ***nova teamo*** neniam antaŭe laboris kune. Tial la tuta renkontiĝo por ni havis eksperimentan karakteron. La hungaraj infanoj venas el la grupo de Erika Tóth, kiu ne povis partopreni kaj peris la akompanadon de la grupo al Gabi kaj Nora, kiuj kutime ne laboras kun la gelernantoj. La germanaj infanoj apartenas al la "kolektajo" de Esperanto-Junularo Brandenburgio/Berlino [EJB], do, ne estas en iu firma grupo, sed pli malpli ofte partoprenis aranĝojn de tiu ĉi organizo. Kun ili laboris/-as Steffen kaj Sabine. Ni, la organizantoj de HEJ kaj EJB, celis atingi la samajn infanojn, kiuj

ĉeestis la unuan aranĝon. La hungaroj tion sukcesis, la germana grupo estis parte nova.

Celo kaj ĉefa tasko estis la "interkultura lernado", la lernado de trajtoj en internacie miksita grupo, la konatiĝo kun alia formo de sociala vivo en tiuspeca grupo. Al la tema programo, al la grupiga procedo, ni volis iomete pli multe aldoni E-on, ol ĉe la unua fojo, sed tamen ni ne intencis fari regulan E-kurson.

Kiel ***metodo***, peri la temerojn, ni uzis denove ludojn.

Ambaŭ grupoj antaŭe havis ***preparajn kunvenojn***. Dum tiu en Germanio ni klarigis al la ĉeestantoj, kion eblas fari en la ejo kaj ĝia ĉirkaŭo. La infanoj aldonis proprajn ideojn kaj dezirojn. Montriĝis, ke ili estas jam pli memstaraj kaj pli kapablaj por transpreni pli gravajn taskojn (i.a. unu knabo organizis la boatadon en la "Spreewald", aliaj preparis ludojn aŭ partojn de la "freneza olimpiado"). El tiuj proponoj formiĝis la programa plano, kiun ni sendis al Hungario.

La infanoj zorge preparis donacojn por sia aprile elektita partnero. Tuj la unuan posttagmezon ili transdonis tion. Ŝajnis bona komenco kaj maniero re-alproksimiĝi, malgraŭ iliaj unua hontemo kaj timemo.

Ni ne volas doni superrigardon pri la unuopaj ludoj, nek pri la programeroj, kiuj farigis la aranĝon riĉega. Por ni pli interese estas prezenti la ***procedon de la grupiĝo*** kaj montri la barilojn, kiuj povas faligi grupeton. Tial la sekva parto eble donas la impreson, ke ni havis multajn malfacilajojn. Tute ne. Nur la koncentriĝo al kelkaj problemoj aperigas tiun bildon. La aranĝo estis samvalora kaj bonetosa kiel la unua renkontiĝo, la stacidomo same dronis en larmoj, post kiam la hungaroj hejmenveturis ... la unuaj postaranĝaj leteroj skribiĝis same jam en la trajno reveturanta al Hungario...

Kiam ni akceptis la hungarojn en la berlina stacidomo, tuj miksiĝis la du grupoj. La hungaraj knabinoj plendis, kiam evidentiĝis, ke en unu el iliaj ĉambroj ne estus germana(j) knabino(j). Tiuj interkonsentis kaj du el ili translokiĝis en la "hungaran knabinan ĉambron". La ok knabojn (kvar po lando) ni devis meti jam de komenco en unu ĉambron.

Laŭ la deziro de la partoprenantoj ni preparis planludon kiel unuan eventon. La internacie miksitaj grupoj devis kune plenumi taskojn. La solvendajojn ni skribis hungare kaj esperante, por ke estu interkompreniĝo inter la "gruperoj", kiujn "kunmiksis" la hazardo laŭ kunmetendaj puzlo-eroj. Entuziasme ili tiun ludon akceptis, ĝis kiam unu grupo tute perdis la esperon, ĉar iuj anoj de alia grupo kaŝis iliajn tasko-slipojn en neatingeblaj lokoj. Ni ne scias, de kiu venis tiu konkurencon-tima malico.

Denove ni ne sukcesis de komenco, "entiri" la hungarajn knabojn en la grupon. Tiu kvaropo dum longa tempo evitis kunagi. Ĉu pro timo de konkurenco, ĉu mankis al ili la persono, al kiu ili povis plene fidi, ĉu kulpas la malcerteco sur nekonata tereno, ĉu minusaj kompleksoj pro la lingva barilo, ĉu malhelpis kulturaj kaj etnaj

diferencoj - ni ne povis facile rompi la hungaran knaban unuecon.

Povas esti, ke ni havas maljustan rigardon al la afero, ĉar la germanaj infanoj estas pli alkutimiĝintaj al ludoj, ke ili eble estas pli fiksitaj al niaj proponoj kaj metodoj, ke ili lernis akcepti tiujn "lud-kutimojn". Sed kial tiam la hungaraj knabinoj plene akceptis kaj kunagis? *1

Ni konstatis, ke la hungaraj knaboj nur unu foje verve partoprenis ludon. Temis pri konkurenca ludo, dum kiu konkursis la du naciaj teamoj. Ĉu tiu batalemo ekestis pro la "fiero pri la nacieco", pro la celo, venki kontraŭ la "fremduloj", montri jen finfine la hungaran fortecon? (Kompreneble ni konsciiĝas pri la efikoj de "konkurencaj ludoj", tamen nin la arda luktemo surprizis.) Cetere: la konkursa situacio okazis nevole de ni. La hazardo diferencigis la grupojn al naciaj teamoj. Tial la rezultoj de tiu ĉi ludo estas por ni interesaj.

La disfalo de la unuecо en la knaba kvaropo komencis per malagrabla afero.

Malaperis mono de hungara knabino. Ni ne volis kulpigi iun, ne volis serĉi "nigran ŝafon", ne volis semi la senton de malcerteco kaj malfideco en la grupo. Tial ni donis al ĉiu la eblecon, remeti la monon, nerimarkeble de la aliaj.

Ni, gvidantoj trairis la fermitan ĉambron lastaj, kaj vidante, ke ne reaperis la mono en la monujo, iu el ni enmetis la koncernan sumon. Poste ni donis la ujon al la knabino kaj instrukciis ŝin, ne doni informon al la aliaj, ĉu estas mono en ĝi aŭ ne. Intertempe ni observis la reagojn de la infanoj. Scivolemon ili ĉiuj montris. Venis la proponoj, kolekti monon en la grupo, por anstataŭi la ŝtelitan sumon. Kelkaj proponis, kontroli ĉies aĵojn. Tuj venis de la hungaraj knaboj la repliko, ke ja estus povinta iu tiom malice, meti monon en ies aĵon, por fari al tiu problemojn...

Post la vespermanĝo, kiu sekvis la diskutadon, la mono reaperis parte ie en la ĉambro, sub la kapkusenoj, en iuj saketoj de aliaj knabinoj ktp.

Dume nia kvaropo ŝajnis pli aktiva kaj entreprenema ol kutime. Iuj el ili kelkfoje forkuris el le manĝejo, revenis, montris scivolemon pri tio, kiel ni traktos la aferon. Maltrankvile ili diskutis inter si, do kondutis entute "strange".

La sekvan tagon la plej sentema knabo el ili havis iujn kverelojn kun la aliaj. Tiu knabo poste pli ofte partoprenis la programerojn de la tuta grupo, forlasis pašon post pašo la hungaran kvaropon. Li havis malfacilaĵojn esti akceptata de la resta grupo. Envolvante lin en la grupajn aktivecojn ni sukcesis finfine, ke li transsaltu la barilojn (aŭ ni influis la aliajn depreni la barilojn).

La plej grandan surprizon ni travivis, kiam la hungaraj knaboj ion preparis kaj prezentis antaŭ la tuta grupo. Tion faris ankaŭ la aliaj infanoj, sed la iniciato venis de la hungara bubaro. Estis por ni nekutime, ĉar estis la unua kontribuo de ili por la tuta grupo. Bedaŭrinde tio nur okazis je la adiaŭa vespero. Ni estus bezonintaj ankoraŭ du aŭ tri tagojn, por ke la grupo vere unuiĝu.

Influon al la grupiga procedo en internacie miksita aro havas kompreneble la

lingvo. Jen la germanoj havis grandan avantaĝon, ili ne kaŭras meze de Eŭropo kun lingvo, kiun neniu komprenas. Sekve iam la hungaraj infanoj plendis, ke la germanoj ja povus lerni hungaran lingvon por ŝanĝi tiun ne-egalecan situacion. Ne surprizo, sed ŝoko estis por niaj oreloj, kiam nia tuta infanaro verve pretis kaj bonege sukcesis lerni tekston de stulta hungara kanto. (Pri la teksto ni silentu. Ni rezignis proteste traduki ĝin al germana lingvo.) Tamen: malgraŭ la per-sona orela karesado la infanoj inter si plej ofte uzis la germanan, parte jam balbutetis Esperante.

La gvidanta teamo ĉiam uzis E-on kaj poste tradukis al hungara aŭ germana, eĉ se rekta traduko al unu el la lingvoj eblis. Gravan influon al la lingva perado havis Vladimir el Ukrainio, praktikanto de GEJ, kiu regas nek la germanan nek la hungaran. Li vole-nevole devis paroli Esperante kun la infanoj. Nur unu foje dum la tuta semajno ni faris rektmetodan E-kurseton.

(Cetere: Erika, post kiam la infanoj denove estis en la lernejo, surpriziĝegis pri la lingva progreso, kiujn ili en la germana faris.)

Momente por ni ĉiuj ne klaras, kiel daŭrigi la projekton. Jam estas la tempo, ke niaj infanoj partoprenu "ordinarajn" E-junularajn-aranĝojn, kie ambaŭ grupoj povos renkontiĝi. Ni pripensas, dum la sekva IJS en Pécs kunvenigi ilin, preparante specialajn programerojn por ili kaj alilandaj samaĝuloj.

Ni, la teamo, por tiuj sekvaj infanaj dibočadoj pretas: Nora kaj Gabi (studentinoj pri lingvistiko el Hungario), Steffen (studento pri komerca matematiko el Germanio) kaj Sabine (studentino pri sociala pedagogio el Germanio).

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ
RAPORTO '96

ESTRARO KAJ KOMISIITOJ

Estraro

Pro la statuta priskribo demisiis Bertil Andreasson kaj Till Dahlenburg. Elektiĝis Bertil Andreasson kaj Raymond Wylleman. Kiel vicprezidanto elektiĝis B. Casini.

La Estraro ne kunsidis printempe, sed nur dum la Konferenco en Tabor.

Komisiitoj

La postenon de la gvidanto de la komisiono "*Eŭropa Komunumo kaj informado en pedagogiaj medioj*" transprenis R. Wylleman.

Komisiono pri lernejaj konkursoj: Aparte laŭdinda laboro de la Komisiono por lernejaj konkursoj, kiu dum la lernojaro 1995/96 sub la gvidado de Géza Kurucz (Hungario) allogis pli ol 150 junajn e-istojn el deko da landoj (Konkurso "*István Szerdahelyi*" kaj Konkurso pri modela parolado "*Ivo Lapenna*"). La Komisiono ricevis subvencion el la Fondajo "*Carson*" kaj kleriga sekcio de Kecskemét (Hungario). Momente konkursas cento da lernantoj (baz- kaj mezlernejanoj) el kvar landoj kaj kvindeko da plenkreskuloj el 18 landoj. La konkurson pri modela parolado "*Ivo Lapenna*" dum la lernojaro 1995/96 partoprenis 14 bazlernejanoj el du

landoj. Pri la konkursoj regule informis Aŭstra Radio Internacia. La konkurso pri arta traduko honore al Kálmán Kalocsay organizata en Hungario, meritas imiton alilande.
Statuta komisiono: Anstataŭ Oene Hoekstra demisiinta membro de la statuta komisiono elektiĝis Hans ten Hagen.
Terminologio: La gvidanto daŭre serĉas kunlaborantojn rilate al la aperinta granda artikolo en RE, 2/96.
Didaktikaj ludoj: Estas preparata katalogo de didaktikaj ludoj. Aperis tre interesa ludo de A. Tellier.

SEKCIO KAJ MEMBRARO

Dum la lasta jaro la nombro de la membraro ne ŝanĝiĝis signife. ILEI havas 789 individuajn membrojn. Kvar membroj mortis.
Pro neaktivado aŭ malapero de la sekcioj kelkaj sekciestroj iĝis reprezentantoj. Landaj sekcioj: 30. ILEI havas reprezentantojn en 21 landoj.
En tri landoj (Francio, Hungario kaj Italio) estis nomumataj novaj sekciestroj.
La sekciestroj kaj reprezentantoj pridiskutis kaj akceptis Gvidliniojn.
Dum la jaro 1996 ne okazis la konkurso "*La plej aktiva landa sekcio*". Kvankam, la Komitato rediskutis la regularon.
Krom regulaj kontaktoj kaj informado pere de cirkuleroj, la informado pliboniĝis dank' al E-redakcioj (gazetaraj kaj radiaj) kaj en la dua parto de la jaro pere de interreto per kiu momente estas atingeblaj 11 sekciestroj kaj 6 reprezentantoj.
ILEI peris helpon (ĉefe instruilojn) al nebonhavaj eŭropaj kaj afrikaj E-instruantoj.
Honora membro: Laŭ la Komitatdecido honora membro iĝis s-ino Mila v.d. Horst, gvidantino de la instrufako de IEI.
Enketado: Pluraj membroj resendis la enketilon, el kiu oni ĉerpos diversajn informojn utilajn por la agado de diversaj komisionoj kaj servoj al instruantoj.

REGIONA AGADO

Eŭropo: Starigitaj kontaktoj kun la organizantoj de la Eŭropa E-Kongreso, okazonta en majo '97 en Stuttgart.
Ameriko: Kelkajn landojn vizitis la estrarano A. Orellana Rojas. Li organizis kunsidojn kun lokaj membroj kaj konsilis pri la plibonigo de la laboro kaj organizis ekzamensesiojn.
Azio: Estrarano Zhang Danchen kontaktas la sekciojn kaj reprezentantojn en la kontinento. Dum la 1-a Azia E-Kongreso okazis ekzamensesio de IE, kaj informbudo pri ILEI.
Afriko: La agado koncentriĝis al Togolando kaj Malagasio, kie okazis ekzamensesioj.

SERVOJ AL INSTRUISTOJ

Provizore, pri tiu tasko zorgas la sekretario, pro la demisio de la komisiito Zsuzsa Barcsay. Surbaze de la ricevitaj enketiloj, estas prilaborita provizora listo de membroj interesiĝantaj utiligi diversajn servojn de la Ligo.
La alvoko aliĝi al la servoj de ILEI estis diskonigita ankaŭ pere de radio, gazetoj kaj interreto. Katalogado de E-klasoj estis parte farita pere de "*Juna Amiko*".

INSTRUISTA TREJNADO

Ankaŭ ĉi-jare, manko da mono malebligis plian subvenciadon dum la jaro 1996, kvankam pluraj interesiĝas pri la eblecoj trejniĝi kaj aparte akiri la diplomon pri instru-kapablo. Tamen, kelkaj sekcioj prizorgis nacian trejnadon (Britio, Albanio, Kroatio, Kubo, Hungario). Parte

tiun laborkampon de ILEI plenumis IEI organizante Csch-seminariojn.

KONFERENCO KAJ GIMNAZIO

Ĉefa jara renkontiĝo okazis tuj post la UK, en Tabor, Ĉehio kun partopreno de kvindeko da personoj. Temo: "*Rimedoj por la bona lernado kaj memlernado de Esperanto*". Paralele kun la Konferenco, okazis la 4-a ILEI-Gimnazio kun partopreno de 7 gelernantoj el 4 landoj.
La konferenca rezolucio estas tradukita al deko da lingvoj.

FINANCOJ

Dum la Komitatkunsido estas akceptitaj novaj membrokotizoj laŭ la principo A kaj B landoj.

ELDONADO

IPR: Sub la gvido de nova redaktoro la revuo plu marŝas kaj regule aperas[1].
Juna amiko: Dum la jaro aperis 4 n-roj (unu duobla). Estas trovita nova redaktoro.[2]

EKSTERAJ RILATOJ

Fondo de la komisiono pri eksteraj rilatoj, kies kerno estas anoj, kiuj ĝis nun aktivis en tiu kampo. La finna sekciestrino organizis informbudon en la internacia kunveno de instruistoj. Reprezentantoj de la norvega sekcio partoprenis *"Internacian kongreson de edukistoj por la paco"* en Lillehammer.
UNESKO: ILEI tre aktivis ĉi-kampe. Tripersona delegacio de ILEI (François Lo Jacomo, Marcel Delforge kaj Bruno Masala) partoprenis junian kunsidon de NGO en Parizo. (vd. RE 7-8/96 p. 121). Komence de oktobro alia triopo (Claude Gacond, Alain Favre kaj Mireille Grosjean) partoprenis Tutmondan konferencon pri edukado en Ĝenevo.
Kunsido de ILEI-aktivuloj ĉe UNESKO okazis dum la UK.
ILEI daŭre kolektas informojn pri la naciaj lernolibroj kie oni trovas tekstojn pri E-o, homaranismo, internaciismo, planlingvoj.
Agado en Usono: Per prelegoj en konferencoj kaj aperigo de trafaj artikoloj en la faka gazetaro aktivas la estrara komisiito Ronald Glossop.
Porinstruistaj organizoj: Nova estrarano pri eksteraj rilatoj skribis al porinstruistaj eŭropaj organizoj. Celo de la skribado estis konigi ILEI al ili kaj proponi kunlaboron.

MOVADA AGADO

UEA: Nia reprezentanto, M. Beloŝević daŭre aktive partoprenas la Estrar- kaj Komitatkunsidojn de UEA.
UEA ne nur morale, sed same mone subtenas la agadon de la Ligo. La prezidanto de UEA ĉiam substrekas la gravecon de la instruado. Estas menciinde, ke UEA kaj ĝia prezidanto daŭre tre subtenas la agadon de la Ligo.
Dum la UK, ILEI prizorgis tre vizitindan programon "*Tago de la Lernejo*". Okazis aparta kunsido de ILEI-anoj, ekzamensesio kaj tehnike bone ekipita budo (kvankam mankis dejorantoj).
LIBE: La evoluo de la kunlaboro dum la lastaj jaroj plifirmiĝis.
IEI: La komuna agado sur la kampo de E-instruado firme daŭras. La kontribuoj de IEI iĝis konstantaj programeroj de la ILEI-konferencoj kaj "*Tago de la lernejo*".[3]
Akademio de Esperanto: Post unujara revo realiĝis la iniciato de la ILEI-estraro. La prezidanto de la Akademio d-ro Werner Bormann partoprenis la inaŭguron de la Konferenco.
La Estraro okazigis apartan kunsidon dum kiu estis diskutitaj planoj de ambaŭ organizoj. Proponita komuna agado fondi komisionon por pritaksi la lernolibrojn kaj aliajn lernilojn.

Aliaj fakorganizoj: La sekretario partoprenis la Forumon de fakorganizoj organizita dum la UK kaj invitis aliajn al la kunlaboro.
Fondumo Zamenhof: ILEI aktive partoprenis la preparojn por la aŭtuna kunsido kaj dank' al tio sukcesis konservi sian lokon la estraro de la Fondumo.

INFORMADO
Flugfolio "Propedeŭtika valoro de Esperanto": Iniciatita dum la Komitat-kunsido en Tabor, la flugfolio jam estas tradukita al deko da lingvoj. Pluraj tradukintoj anoncis pretecon estonte traduki pedagogiajn tekstojn nacilingve.
Komunikiloj de ILEI: De oktobro la sekretario regule preparas mallongajn informojn pri ILEI (i.a. diskonigaj taskoj por la konkurso *I. Szerdahelyi*).
Kontaktoj kun E-gazetaro kaj E-elsendoj: Regulaj informoj pri la agado aperas en tri internaciaj E-gazetoj: *Esperanto, Eventoj, Heroldo de Esperanto.*
ILEI flegas bonajn kontaktojn kun la radioelsendoj (speciale ARI kaj PR) Lastatempe la informoj pri la aktivado estas regule sendataj al ĉiuj radiostacioj rete atingeblaj.
Reto: De septembro pluraj informoj pri la agado estas regule dissendataj rete. Iuj ricevintoj plusendas ilin al deko da adresoj. Ekpreparata ILEI-retadresaro kaj ILEI TTT-paĝo.

EKZAMENOJ
En 1996 okazis 13 sesioj en 9 landoj de 4 kontinentoj. Kandidatiĝis 67, sukcesis 30 en la elementa kaj 15 en la meza ekzamenoj. Ankaŭ ĉi-jare multaj kandidatoj petis de la sekretario informojn kaj malnovajn testojn, kio sendube plibonigis iliajn rezultojn.
Aparte menciinda sesio dum IKBE, dank' al la preparlaboro de ge-sroj Moerbeek. (Anoncita venontjara sesio dum la Kongreso de handikapitaj E-istoj).
UEA pretigis gvidlibron kiu elĉerpiĝis.
Membroj de la IEK voĉdonis pri novaj ekzamenaj rajtigitoj.

Okazintaj sesioj en la jaro 1996:
Kostariko, San Jose, 12-17.02. – Argentino, Cordoba, 04-06.04. – Kroatio, Zagreb, 02-08.07. – Brazilo, Riberia Preto,05-10.07. – IKBE, Ĉeĥio, Prago,16-20.07. – UK, Ĉeĥio, Prago, 20-27.07. – ILEI-Konferenco, 27.07-02.08. – Danio, Kopenhago, 06-11.08. – Britio, Barlaston, 14-18.08. – Togolando, Lome, 23.08. – Ĉinio, Sanhajo, 22.-25.08. – Madagaskaro, Antalamarivo, 23-30.08. – Kroatio, Zagreb, 13-14.12. – Togolando, Lome, 28-29.12.

Sukcesintoj laŭ landoj:
Albanio-1, Alĝerio-1, Argentino-1, Belorusio-1, Britio-4, Brazilo-2, Ĉeĥio-3, Ĉinio-4, Francio-2, Ganao-1, Germanio-1, Hungario-2, Kameruno-1, Kroatio-4, Kubo-1, Kostariko-1, Malagasio-1, Meksiko-1, Nederlando-1, Pollando-1, Rusio-2, Rumanio-2, Taĝikio-1, Togo-2, Ukrainio-2 , Usono-1

ALIAJ PROJEKTOJ
Infanoj en la mondo
ILEI subtenis la projekton gvidatan de Enrique Kohei el Argentino.
IĈLM
Kadre de JA realiĝis la kunlaboro kun IĈLM. Dum la Semajno de Internacia Amikeco pluraj bazlernejaj E-grupoj organizis la infanan ago-tagon.

Marija Beloševiĉ

Notoj de la Redakcio:

1. *IPR.* Dankon pro la "iom" magra, tamen laŭda opinio de la Estraro pri nia revuo.
2. *Juna Amiko.* Dum la jaro aperis 4 numeroj, unu duobla. Pagintaj abonantoj restas je la nivelo de 1995 (1150), sed ene de tio, la plentarifaj abonoj kreskis je 10 %. Elstaris Brazilo kaj Japanio. Fermiĝis 10-jara redakcia periodo en kiu kreskis la ofteco (3- ĝis 4-foje jare), la amplekso (24 ĝis 32 paĝoj) kaj la nombro de plentarifaj abonoj (de 6 ĝis pli ol 600), kaj kiu vidis unuafoje centrigon de ĉiu fazo – enhava kaj grafika redaktado, administrado, varbado, ekspedo – ĉe unu respondeculo. Nova sed konata redaktoro oficas ekde 1997, permesante bonvenan malcentrigon de la laboro. Jarfine konsentita kolektiva abono de Brazila Esperanto-Ligo por 600 ekzempleroj aŭguras bone por la nova redakcia regno.
3. *IEI.* ILEI donacis al IEI en 1996 pere de sia eldona komisiito pli ol 50 paĝoj da apoga materialo por la vidbendo *Mazi en Gondolando.*

ILEI-estrarkunsido en Parizo

La Estraro de ILEI kunsidis en Parizo (17-19 de januaro). La kunsidon ĉeestis: D. Charters, B. Andreasson, A. Orellana Rojas kaj M. Beloševiĉ. La kunsidon ĉeestis ankaŭ Renée Triolle, viceprezidanto de UEA kaj parte (laŭ aparta invito de la prezidanto) Bruno Masala kaj François Lo Jacomo. Pro malsano ne alvenis B. Casini kaj R. Wylleman.
La Estraro pridiskutis la Jarraporton de la Ligo [*vd. la nunan numeron*].
Post preparo de la finkalkulo, la financan raporton liveros la kasisto.
ILEI-fondaĵoj kaj kasoj:
Estis proponita revizio de la listo de koleghelpa kaso. La prezidanto forsendos la alvokon al la membraro membriĝi en la kategorio dumviva membro kaj kontribui al diversaj ILEI-kasoj kaj fondaĵoj. Surbaze de antaŭaj diskutoj kaj decidoj (Estraro, Komitato) la Estraro daŭre esploras la eblecon aĉeti kelkajn ilojn por plifaciligi la laboron de unuopaj estraranoj.
UNESKO: Antaŭ la kunsido, la sidejon de UNESKO vizitis D. Charters akompanata de F. La Jacomo. Kun la oficistoj ili pridiskutis ĝisnunajn rilatojn kun UNESKO kaj estontan kunlaboron. Por pruvi ke la Ligo kaj unuopaj membroj agas tra la mondo, ILEI disponigis al UNESKO ankaŭ la Jarraporton kaj adresliston de la membraro. (Pri la vizito apartan cirkuleron preparas la prezidanto.)
Eldonado: Ĉar ekzistas interes pri ĝisdata verko pri la metodologio de E-instruado, kaj ke ideale estus verki tri-voluman libron – teorio, praktiko kaj kompilajo de la plej utilaj jam eldonitaj artikoloj pri pedagogiaj temoj – la prezidanto esploros tiun eblecon kun aliaj fakuloj pri metodologio dum la venontaj monatoj.
Ekzamenoj: Estis diskutitaj ekzamensesioj okazintaj dum la jaro 96. Pro la fino de trijara mandato, estis akceptita nova konsisto de la Internacia Ekzamen-komisiono. La konsiston devas ankoraŭ rekoni kaj la Estraro kaj la Komitato de UEA. Ĝis tiam funkcias la malnova Komisiono.
A. Orellana Rojas prilaboris novan "Gvidlibron por la elementa kaj meza ekzamenoj" kiun eldonos UEA.
Kampanjo 2000: La Estraro konstatis, ke la reviziita teksto de la Eduka rezolucio akceptita de

la Komitato de UEA en Vieno donas sufiĉe solidan bazon por la agado de ILEI. Oni devas rekontroli kio fakte estis farita. Post la redaktado, la teksto estos forsendita al la sekcioj. Estas petataj la sekciestroj, diskuti kun la membraro la tekston de la Kampanjo sendita aŭtune.

TTT-paĝo de ILEI: Bruno Masala prezentis la proponon pri ILEI TTT-paĝo: I-a parto: informoj multlingvaj, II-a parto: informoj pri la eldonaĵoj, III-a parto: konkursoj de ILEI

La paĝo plej verŝajne aperos antaŭ la UK. La Estraro esploras plej bonan solvon por ĝia hejmiĝo.

Lerneja eksperimento: La Estraro akceptis la kunlaboron kun UEA pri la nova Lerneja Eksperimento, lanĉota plej verŝajne ĉi-aŭtune. Flanke de ILEI pri ĝi aparte okupiĝos D. Charters kaj Mauro La Torre.

Trijara laborplano 1998-2000: La Estraro taskis la sekretarion revizii la nunan planon kaj prezenti ĝin al la Komitato.

Regularoj: La statuta komisiono proponis ŝanĝon de la Interna regularo, ĉar la Statuto donas tiun eblecon. Elekto-regularo: Surbaze de la proponita elekto-regularo (disdonita dum la Komitatkunsido en Tabor) la statuta komisiono prilaboris novan version.

Funkciuloj: La Estraro aprobis la taskodividon ene de la Estraro [*vd. la duan kovrilpaĝon*].

Estraraj elektoj: Laŭ la plano, ĉi-jare devus demisii du estraranoj (prezidanto kaj sekretario). Pro la timo ke la ĉi jara Komitato en Aŭstralio ne havos kvorumon, la Estraro proponos al la Komitato ne okazigi la elektojn kaj prokrasti ilin por unu jaro. La prezidanto kaj la sekretario pretas servi unu plian jaron en tiu kazo.

Sekciestroj kaj reprezentantoj: Estis aprobitaj novaj sekciestroj: József Németh (Hungario), Mauro La Torre (Italio) kaj novaj reprezentantoj: Maria Majerczak (Pollando), Hamzai Safii (Irano). Oni akceptis ankaŭ la proponon en Danio nomi la reprezentanton Wolfgang Kirschstein. La sekciestroj de la sekcioj kiuj dum la antaŭa(j) jaro(j) havis malpli ol kvin membrojn provizore iĝas reprezentantoj. Ili ricevos apartan leteron.

Pro la neaktivado, estis forstrekitaj kelkaj reprezentantoj en afrikaj landoj. (Pri ĉi tiu problemo jam sufiĉe longe la estraranoj korespondis kun Hans Bakker kaj la decido estis farita surbaze de tio.)

La Estraro esperas je baldaŭa aliĝpeto de la aŭstralia sekcio.

Laŭ la akceptita gvidilo por sekciestroj kaj reprezentantoj, la Estraro decidis konfirmi la trijaran mandaton de la sekciestroj kaj reprezentantoj kiuj bone plenumas siajn taskojn. Tamen, oni ne forgesu, ke la Estraro rajtas post unu jaro ĉesigi ies mandaton.

Konferenco kaj aliaj pedagogiaj aranĝoj: La Estraro estis informita pri la preparoj por la Konferenco en Aŭstralio. Francio 1998: A. Orellana Rojas ekkomencis la esploradon pri la konferencejo.

IMS 97: anoncita dum la Komitatkunsido en Tabor bedaŭrinde ne okazos.

Trejnseminario '98: La Estraro planas proponi la seminarion antaŭ la UK '98. D. Charters estis taskita esplori la lokon kaj liveri programon.

ILEI dum la UK: Kiel kutime, dum ĉi jara UK ILEI zorgos pri "*Tago de la lernejo*", ekzamensesio, organizos la kunsidon de ILEI-anoj kaj budon. Por la ricevo de hor- kaj tagdivido flanke de UEA, la sekretario komunikos la ILEI-agendon dum la UK al la sekciestroj. Tamen, estas petataj sekciestroj esplori ĉe la membroj kiuj partoprenos la UK-on, kiu pretas dum iom da tempo dejori ĉe la budo. Informo bonvenos antaŭ la 20-a de majo.

Rilatoj kun aliaj E-organizoj: La Estraro diskutis pri la rilatoj inter la Ligo kaj aliaj E-organizoj. Ili kun ĝojo konstatis, ke la kunlaboro kun UEA estas bona. La Estraro daŭre strebas

ekstarigi kontaktojn kun E-organizoj kiuj aktivas edukkampe.

IEI: diskutita kaj akceptita redaktita kontrakto pri la kunlaboro.

Ceterajoj: La Estraro estis informita pri la evoluo de nova video-projekto en Usono. La Estraro subtenis tiun projekton, sed konstatis ke ILEI bedaŭrinde ne povas mone kontribui al ĝia realigo.

ILEI kunsido en Stuttgart

Kadre de la Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso en Stuttgart (16-19 de majo 1997) kunsidos la ILEI-anoj. La kunsido okazos vendrede, la 16-an de majo inter la 19-a kaj 20-a horo. Pri la salono bv. konsulti la kongresan libron.

Dum la kunsido oni i.a. pridiskutos la kontribuon de ILEI al la Kampanjo 2000. Dum la Kongreso funkcios ankaŭ ILEI-budo. Bonvenas dejorantoj-volontuloj.

Marija Belošević

Recenzoj

Mazi en Gondolando - Esperanto, Ekzercu kaj Ludu. Aŭtorino - Barbara Chmielewska. Kunlaboro: Roman Dobrzynski kaj Stefan MacGill. Ilustrajoj - Ewa Michen - Ulicka. Kopirajto: BBC, Tommy kaj Internacia Esperanto-Instituto. Eldonisto: Tommy 1996

Por akompani nian tre ŝatatan videokurson 'Mazi en Gondolando', feliĉe reaperis la longe atendita aktiviga libro por infanoj. Tre alloga multkolora libro de desegnaĵoj kun paĝoj 17x24 cm faritaj kaj el papero kaj el kartono, ĝia enhavo konsistas el 93 paĝoj de diversaj, bone elpensitaj ekzercoj kiuj ampleksas plejparte la gramatikaĵojn trovitajn en la unua vidbendo de la kurso. Infanoj kiuj ŝatas ne nur legi, sed ankaŭ eltondi kaj glui, fervore trapaŝos la libron lernante E-on kaj sendube elmordante ĝiajn paĝojn. Tiel, ĝi ne estas libro por meti sur breton de biblioteko por trafoliumado! Kvankam la libro celas infanojn, miaopinie ĝi efikos se plenkreskulo gvidos la junan lernanton.

La aŭtorino komencas la libron per la alfabeto-kanto, bona ekzerco por ekde la komenco bone elparoligi la infanojn. Por ŝanĝi aktivon, jam sur paĝo 8 troviĝas la unua bildo por eltondi. Metante la fingrojn tra la truoj por aktoradi, la infano imagas sin Karlo, aŭ Silvja aŭ alia personaĵo por sin prezenti al siaj gepatroj/klaskamaradoj elmontrante la unuan scenon 'Kiu vi estas?'. Eble, je tiu ĉi momento plaĉus eltondi ankaŭ la aliajn tiajn bildojn por tuj rekrei la tutan reĝan familion. Se vi bezonas helpon kiel uzi la personaĵojn, la aŭtorino mem, sur paĝo 94 donas konsilojn.

Por rilatigi la rakonton kaj la vorttrezoron al la ĉiutaga vivo de la infanoj, la aŭtorino prudente enkondukas la foton de vera knabino kaj ankaŭ kelkajn nomojn de objektoj de domo aŭ klasĉambro. Tamen allogaĵo por infanoj estas ankaŭ la fantazio! Sur paĝo 65 troviĝas mirindaj, buntaj bestoj diversformaj por pritrakti la kolorojn.

La lastaj paĝoj liveras diversajn ludojn por kontroli la E-lingvoscion sed ankaŭ por instigi al la unua paŝo en la vastan eksteran mondon per aliĝo al *la Kastora Klubo*

- *Internacia Koresponda Esperanto-Klubo de Amikeco*, kiu inkluzivas la Rondon de Mazi-Amikoj.

Malgraŭ ankoraŭ kelkaj etaj preseraroj kaj malfacilaĵoj pri la paĝordigo, la libro estas bona, porinfana akompananto al la videokurso '*Mazi en Gondolando*', aldonanta eblecojn al infanoj ekzerci kaj ludi dum ili lernas. Mi rekomendas al ĉiuj Mazi-amantaj gepatroj, geavoj kaj geinstruistoj de elementa lernejo aĉeti la libron siaj infanoj.

***Jennifer Bishop**, instruistino,*
39 Hill Street, Hawthorn, Victoria 3122,Aŭstralio

* * *

La infanoj en la arboj / Gudrun Pausewang. Kun ilustraĵoj de Inge Steineke. Interkulturo, Maribor. Esperantigis Nora Caragea.

La libron de Gudrung Pausewang mi konsideras tre valora el pedagogia vidpunkto, ĉar ĝi donas eblon:

- konatiĝi kun nova geografia regiono
- ekkoni la vivon de tiaj malriĉaj kamparanoj; ilia laboro, konstruo de domoj-kabanoj
- konatiĝi kun novaj vortoj ligitaj kun la naturo: kampa laboro, klimato, nomoj de birdoj kaj bestoj, kreskaĵoj, manĝaĵoj, ekzotikaj arboj.

Instrua estas la priskribo de malriĉa familio Santana; naŭ infanoj kaj la gepatroj. Ili ĉiuj laboras, vivas modeste, sed la infanoj ne ŝajnas esti malfeliĉaj - ili ofte ludas, estas solidaraj.

Kontraŭe al pluraj aliaj fabeloj kaj alispecaj infanlibroj, la priskribo de malriĉeco estas simpla, ne tro emfaza, sen drastaj esprimoj, per kiuj ofte aŭtoroj de infanlibroj celas elvoki kunsenton de la leganto. Tie, ĝuste per simpla, ekvilibra priskribo la aŭtorino akiras la samon, sen elvoko de troa malĝojigo.

Alia grava afero en tiu rakonto estas la solidareco inter la infanoj, de apartaj medioj, ekde la unua ekvido.

Umberto - filo de granda ter-posedanto kaj de la Arbaro-Mastro Ripoll, kiam la patro lasis lin por momento ĉe familio Santana, tuj komencas kun ili labori, amuziĝi, manĝi apetite; tian manĝaĵon kiun en lia hejmo manĝas nur la servistaro... Fariĝas gaja. Por la unua fojo en sia vivo li grimpas sur arbojn. Pere de siaj novaj amikoj proksimiĝas al la naturo...

Pedagogiaj konkludoj: La libro de Gudrun Pausewang en tre klara traduko, spegulante bonege la etoson de la rakonto de Nora Caragea, kun bonegaj modern-formaj, sed ne modernismaj... ilustraĵoj de Inge Steineke povas esti tre utila por la infanoj de ĉiu aĝo, ĉar ĝi tuŝas gravajn problemojn de niaj tempoj: maljuston socian, minacon al la naturo fare de monavidaj, konsumismaj nuntempaj homoj. Ĝi montras, kia devas esti nepra direkto de nia civilizacio - protekto de la natura medio. Ĝi indikas pri nepro de homa solidareco por realigi tiun celon. Kaj kio aparte gravas, ĝi instruas,

ke la infanoj estas plenvaloraj homoj, nur malpli altkreskaj, kaj ke grado de ilia sentemo plej ofte superas tiun de la plenkreskuloj.

La edukanto, E-instruisto, povas profiti de tiu libro por paroli pri geografio, naturo, kutimoj en foraj landoj, ĝenerale sociaj kaj infanaj problemoj.

Surbaze de tiu libro eblas fari konkurson de pentraĵoj, aranĝi kvizon, prepari ludon kaj kun la infanoj la rakonton ankaŭ surscenigi. [...]

Tute prave, tiu ĉi libro estas *Infanlibro de la Jaro 1995*, laŭ la decido de la Komisiono pri Belartaj Konkursoj de UEA. Ĝi plene tion meritas.

***Zofia Banet-Fornalowa**,*
str. Bliska 12, PL-05-090 Raszyn, Pollando Tel. (22) 7560342

El svedaj plumoj

Atingis nian redakcion triopo da libretoj el la sveda eldonejo Al-fab-et-o. Ĉiu estas kajero en la formato A/5 kun firma unukolora kovrilo, surhavanta bildtitolon. Ilia amplekso estas 32, 40 kaj 56 paĝoj. La presado kontentigas ĉiuflanke, egale, ĉu temas pri litergrandeco, papero, litertipoj, klareco, paĝoaranĝo ktp., kvankam foje sentiĝas la eblecoj kaj la limoj de komputila kompostado, kiu ne nepre estas identa kun tiu de iama profesia kompostado. Preseraroj troviĝas malofte; la lingvajo sekvas la ĝeneralajn normojn, iel dependante de la nacilingva originalo aŭ la celgrupoj. La broŝura eldonmaniero konvenas al la enhavoj kaj la celatoj; eble la libro "Mariamne" meritus iam pli dignan eldonadon rilate la eksteran aspekton.

Jen kelkaj informoj pri la unuopaj libroj:

1. "**MARIAMNE**" estas verko de la svedo Pär Lagerkvist kaj - laŭ la kovrila informo - "kvazaŭ kvintesenco de la verkado de L.". Temas pri psikologia studaĵo forme de, nu, oni nomis ĝin "romano" (56-paĝa). La aŭtoro elokvente vortigas la komplikan rilaton inter la reĝo Herodo, misfama pro la betlehema murdigo de infanoj, kaj lia edzino Mariamne. Prezentiĝas la konata konstelacio de oferiĝema virino kaj monstra viro, enplektita en historian eventon. Fantazie la aŭtoro evoluigas la intrigon, interese prilumante la du kontrastajn karakterojn. Ja la romano ne estas science ellaborita, nek historie nek psikologie; ĝi estas literaturo. Sed tiel ĉio povus esti estinta. Tiu ĉi verko, originale aperinta en 1967, nun estas alirebla ankaŭ flanke de e-istoj, danke al la traduko de Bertil Nilsson. Certe ĝi estos "simpla, samtempe alte beletra" legaĵo ne nur por "studantoj de E-o", kiel esperas la eldoninto.

2. "**LA ORPANTALONO**" ne aludas oran pantalonon, sed estas metafora titolo por libro, en kiu simpla malnova pantalono mirakle provizas junulon per ne-elĉerpeblaj monsumoj. La figuro de tiu ĉi knabo destinas la libron al la junularo. La historio evoluas en bela sveda pejzaĝo, forte sentiĝas la sveda medio. Tamen la enhava esenco ne limiĝas al la norda lando. La interhomaj rilatoj ĉie samamaniere funkcias, kaj tial

la juna svedo Mats povas esti modelo ankaŭ por junuloj aliaterenaj. Forme de streĉa krimrakonto la aŭtoro sentrude edukas al interhoma solidareco, do la rakonto ne estas simple fantazia distraĵo, sed edukilo, kiaj hodiaŭ mankas en la kontinua krimumado televida.

Ĝi estas ankaŭ lingva edukilo: Ĝi uzas nur proksimume 450 morfemojn "elektitaj ne el apriora listo sed pro efektiva bezono". Tamen la lingvaĵo ne aspektas primitiva. Certe la libreto estas konvena, bonvena legaĵo por instruaj celoj.

Pri la aŭtoro oni eĉ ne la nomon ekscias, sed tio ne malvalorigas la tuton. La eldonista celo "teni en preteco taŭgajn faciligilojn (por pli malpli aŭtodidakte lerni la lingvon)" plene plenumiĝas per tiu ĉi kajero.

3. La tria libro "***INTRODUKTION TILL ESPERANTO***" jam titole montras la celataron: svedoj informiĝemaj pri E-o. Sekve la baza lingvo de la kajero estas la sveda. Unue la aŭtoro Bertil Nilsson mallonge ĝenerale enkondukas en la ideon de E-o. Post la informoj pri la prononcado kaj la elementaj gramatikaj reguloj, li jam instigas al parolado. Participoj, antaŭ- kaj postfiksoj, la prepozicioj kaj mallonga vortlisto kompletigas la strukturajn klarigojn. Sekvas mallongaj, jam komence kompreneblaj tekstoj en E-o, ĉiam akompanataj - kiel ĉie en la libro - de nacilingvaj tradukoj. Sendube estas avantaĝe, ke la aŭtoro enscntrigis la internaciajn vortojn, kiuj pro la jama scio tre faciligas la aliron al la nova lingva sistemo. Lastpaĝe ne mankas adresoj, kiuj helpas ektrovi la vojon al la utiligado de E-o.
Tiaj estu informiloj en naciaj lingvoj pri la Lingvo Internacia. Ja ne pompe bunta, trude fanfarona, ĝi tamen certe altiros seriozajn homojn, kiaj troviĝas ankaŭ inter la junuloj. Vasta sukceso estas dezirinda al tiu ĉi lerta informilo, kiu cetere povus esti modelo por aliaj naciaj lingvoj.

Postvorte: La recenzanto ŝatas aldoni, ke por li ĉiam ankoraŭ estas mirinde, ke - nur - pere de E-o estas eblaj tiaj transkulturaj kontaktoj, kia tiu ĉi recenzo: Pere de E-o li lernis ankaŭ la naciajn lingvojn sveda kaj hungara. La recenzokomisio pri svedaĵoj do iris de hungara redaktisto de Esperanta gazeto al germano - kvarangulo certe ne tre ofta. ***Franz-Georg RÖSSLER***, Germanio

Memorigo pri Katina Dacini ✞

Dum la tagoj 18-a kaj 19-a de februaro grupoj de samideanoj kunvenintaj en Maso kaj en Pizo, sin rigardantaj per senaŭdeblaj voĉoj, per intensa penso kaj spirita kunestado, salutis la finon de la tera vivo de Katina Dacini (Catina Dazzini). Ili alportis intime salutojn de samideanoj el diversaj regionoj de la nordo kaj de la sudo de Italio.

Ankoraŭfoje regis impreso de la sentoj pri "esti aŭ ne esti", sed la agado de Katina restas en la memoro, kiel subtenilo de decidoj kaj kondutoj en la esperantista kampo, precipe en la instruada.

Katina Dacini komencis interesiĝi pri E-o tre juna, kiam ŝi sekvis asertojn kaj ekzemplojn de la frato Marjo. Ŝi fariĝis lia aktiva kunlaborantino, precipe en organizado de E-instruistoj, ĉu naciaj ĉu internaciaj, ankaŭ se tro ofte ŝi fidis pri kunagado de bonvolemuloj.

Plurfoje ŝi estis elektita kiel ĉefdelegitino de UEA en Italio. Konata kiel instruistino pri beletro en mezgradaj kaj superaj lernejoj, ankaŭ en konversacioj ŝi instruis la lingvon internacian kaj ne forlasis okazojn por klarigoj kaj, laŭnecese, korektoj. Ofte ŝia ĉeesto per kantoj revekis dum ekskursoj la ĝojon de la kunestado.

Malsano en la kruroj dum la lastaj jaroj bremsis ŝiajn agadojn; tamen per helpo de porinvalidaj ĉaretoj ŝi daŭre ĉeestis preskaŭ ĉiujn manifestaciojn en Italio kaj eksterlande, alportante gratulojn kaj sugestojn. Dum la lastaj vintraj monatoj ŝi ŝajne fartis pli bone kaj kontente moviĝis preskaŭ libere, sed atako de vejna embolo subite interrompis funkciadon de la koro kaj de la pulmoj.

Ŝi ĉiam sugestis agadojn kaj iniciatojn por atingi atenton de la lernejaj aŭtoritatuloj, kaj per la persona sindonemo ŝi atingis rezultojn.



Espereblas ke ŝia ekzemplo estos daŭra stimulado por plifortigi iniciatojn kaj metodojn. Pri ŝia agado menciindaj estas la rilatoj kun la organizaĵoj en Sanmarina Respubliko por la Akademio de Sciencoj, ŝia konstanta, preciza kaj tre grava laboro pri la Biblioteko de Esperanto en Kastelo Malaspina, je kiu sekvis starigo de la E-sekcio ĉe la Ŝtata Arkivo en Maso, la granda laboro por traduki la verkon de germana filozofo prof. Vogelman.

Krome ŝi ĉiam partoprenis la komisionon por studi kaj subteni la enkondukon de E-o en la lernejojn, ekde kiam, en la jaro 1964, la koncerna leĝpropono komenciĝis esti konsiderata de pluraj italaj parlamentanoj.

Ni ĉiuj ŝuldas al Katina Dacini – kiel al la frato Marjo kaj al aktivaj kunlaborantoj – la paŝojn per kiuj E-o progresis. Nia devo estas daŭrigi tiun progreson, ankaŭ inter malfacilaĵoj devenantaj de novaj administraj reguloj kaj de novaj personoj kun ŝanĝiĝantaj pensmanieroj, ĉar la celo de E-o estas ĉiam aktuala, kiel kultura helpo al kunigado de la homoj.

Umberto Stoppoloni,
prezidinto de Itala Esperanto-Federacio

Faksilon al E-lernejoj?

– alvoko el Eventoj N-ro 121. –

La multobligila firmao "Gestetner", produktanta i.a. ankaŭ faks-aparatojn faras tre malavaran proponon: se pro io ajn motivo (vi aĉetas novan, ĝi difektiĝis ktp) vi senigas de via faksilo kaj donacos ĝin al la firmao, ili riparas, refunkciigas ĝin, kaj senpage donacas la faksilon al iu lernejo ie ajn en la mondo, precipe en Eŭropo.

Nur ni pensu: se ni povus pere de Gestetner provizi al ĉiu lernejo kie oni instruas E-on senpagan faksilon kun la faksnumeroj de ĉiuj aliaj lernejoj, kie E-o estas instruata, uzata, kia instigo ĝi estus al la instruado? - Sed ni bezonus la adresojn de la lernejoj...

Oni ofte diras, ke iuj lernejoj en Hungario, en Ĉinio, en Brazilio uzas Esperanton, sed ni neniam vidas adresojn. Ĉu ni povus kompili la adresaron? Kion vi opinias?

Will Green, 202 Dunkery Rd, Mottingham, London SE9 4HP, Britio

Rim. Ni havas specialiĝintan fakan asocion ILEI, kiu okupiĝas pri lernejoj. Sed ĉu ILEI kapablas? - *La red. de Eventoj*

[Noto - Marija Belošević mesaĝis al nia redakcio, ke ILEI liveros la menciitan adresaron. Ni petas la funkciulojn kaj anaron de ILEI, ke ili helpu la sekretarion en tiu laboro – La red. de IPR]

Postparolo

Pro teknikaj malfacilaĵoj de nia urba centro, mia retadreso, anoncita en la postparolo de la lasta numero, tamen ne ekfunkciis. Pro tio mi serĉis novan aliron al la reto. La novan adreson vi trovas sur la eksteraj kovrilpaĝoj. Redaktofino de tiu ĉi numero estas la 15-a de aprilo, por la sekva numero la 15-a de aŭgusto 1997.

Jozefo Németh, *redaktoro*

SEKCIESTROJ de la LIGO

Albanio: Bardhyl Mezini, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, Tirana
Argentino: Teresita Alaníz, Hipólito Yrigoyen 2578 P5 Dto 30, AR-1090 Capital Federal
Aŭstrio: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien
Belgio: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende
Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106-010 Sao Paulo (SP)
Britio: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 8QD
Ĉeĥio: Miroslav Malovec, Bosonozská 15/10, CZ-625 00 Brno
Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan
Finnlando: S-ino Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, FI-69440 Lestijärvi
Francio: Fernand Micoud, 8 rue des Maures, FR-69320 Feyzin
Germanio: Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn
Hungario: József Németh, Kilián ltp. 75/9, HU-8500 Pápa
Italio: Maŭro La Torre, Viale Bardanzellu 117, IT-00155 Roma
Japanio: Masumi Suzuki, Inokashira 3-5-12, Mitaka-shi, Tokio, 181 Japan
Kroatio: Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59. HR-10000 Zagreb
Kubo: H. Jiminéz, Apartado 5120, CU-10500 Ciudad de la Habana
Nederlando: Hans ten Hagen, Middenweg 587, NL-1704 BH Heerhugowaard
Nordameriko: Dorotea Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono
Norvegio: Björn Thuv, Aröyveien 33, NO-3135 Torod
Rumanio: Prof. Popa Florica, Str. Eroilor 29, ap.7. RO-1900 Timisoara
Rusio: Irina Gončarova, Molocznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000
Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby
Svislando: Mireille Grosjean, Rue du Temple 20, CH-2416 Les Brenets

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, AM-375062 Erevan
Aŭstralio: Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney, SA 5069
Bangladeŝo: vakas
Bharato: Abani Halter, Jamboni, P.O. Bolpur 731204, W. Bengal
Bulgario: Kiril Velkov, D. Todorov 9, BG-3000 Vraca
Centrafrika Respubliko: vakas
Ĉilio: Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago
Danio: Wolgang Kirschstein, Hvedebjergvej 30, DK 8220 Brabrand
Estonio: Eve Otsa, Liivalaia 30-12, EE-0001 Tallinn
Irano: Hamzeh Šafii, P.O. kesto 13445-915, Teheran
Islando: Loftur Melberg, Skolabraut 1, IS-220 Hafnarfjördur
Israelo: Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
Jugoslavio: Radojica Petrovic, Bul. Oslobodjenja 36, YU-32000 Cacak
Kostariko: Jorge A. Leoni de León, Apartado 7603, CR-1000 San José
Koreio: So Jin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900
Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius
Niĝerio: vakas
Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1.
Pollando: Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7m. 122, PL-30150 Krakow
Portugalio: João Santos, p-a Portugala Esperanto-Asocio. Rua Dr. João Couto 6 r/c A, PT-1500 Lisboa
Sanmarino: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, SM-43031 San Marino.
Slovakio: Anton Zachariáš, Sobotské námestie 6, SK-05801 Poprad.
Slovenio: Sonja Tavčar, Liminijanska 6, SI-66320 Porotoroz.
Sud-Afriko: vakas
Tanzanio: Mramba Simba, S. L. P. 1051, Bunda Mara
Togolando: Afantchao-B.Yao, B.P. 20225 Lome
Ukrainio: Svetlana Fedotova, P.O. Kesto 88, UA-253222 Kiev
Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Ab. kesto 140, UZ-700000 Taŝkent, CIS
Venezuelo: Prof. J.E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A
Zairio: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

LABORKOMISIONOJ

Didaktikaj ludoj: Georges Sossois, rue du Basson 79, BE-6001 Marcinelle, Belgio; tel. (+32 71) 43 62 05

Ekzamenoj: prez.: Mag. Atilio Orellana Rojas (adreso, kovrilo 2)
Sekretario de elementa kaj meza niveloj: d-ro Ivan Bekavac-Basić, (adreso, kovrilo 3)

Eksteraj rilatoj: Raymond Wyllemann - Belgio (prezidanto), Marija Beloševiĉ - Kroatio, Marcel Delforge - Belgio, Ronald Glossop - Usono, Mireille Grosjean - Svislando, Francois Lo Jacomo - Francio, Bruno Masala - Francio

Eŭropa Komunumo kaj informado en pedagogiaj medioj: Raymond Wylleman

Gazetara servo kaj informado: *vakas sed pretas kunlabori:* Germain Pirlot, Steenbakkerstr. 21, BE-8400 Oostende; tel. (+32 59) 70 87 00 kaj Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien, Aŭstrio; tel. (+43 222) 36 86 29

Konkursoj lernejaj: Géza Kurucz, Nyíri u. 11, HU-6000 Kecskemét, Hungario

Lerneja kontaktigo kaj statistikado: Provizore plenumata pere de *Juna amiko*

Statuto: Rob Moerbeek kaj Hans ten Hagen

Terminologio: Maŭro La Torre, Viale Bardanzellu 117, IT-00155 Roma, Italio

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO: (rilatoj de reciproka informado, kat. C): Place Fontenoy, FR-75007 Paris
Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, FR-75010 Paris

UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

IEI: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

La membreco inkluzivas ricevon de kvar numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto.

Kasisto de ILEI: *Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby, Svedio; poŝtĝirkonto 682117-7 (Stokholmo).* Membrokotizoj: NLG 22 por landoj en A-kategorio, NLG 20 por landoj en B-kategorio (laŭ UEA-divido). Simpla abono sen membreco (por E-societoj, bibliotekoj k.s.): 30 NLG. Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj cĕ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas.

Alia pagmaniero estas al UEA: **UEA**, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago kaj la interan konton de ILEI: *ilek-a.* aŭ por *Juna amiko*: *juna-l.* Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago. Membreco: 20 NLG en landoj sen sekcioj, 25 NLG en landoj kun sekcioj.

KONTRIBUAĴOJ AL IPR

Kontribuaĵoj al IPR estu laŭeble nete tajpitaj per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj, taŭga por aŭtomata komputila enlego, aŭ surpapere prespretaj. Livero sur IBM PC-kongruaj disketoj (5,25 aŭ 3,5 colaj) bonvenas. Retadreso de la redaktoro: nlalt@konyvtar.c3.hu. Retadreso de la viceredaktoro: smidik@rik.bdtf.hu. Ili ambaŭ povas akcepti ankaŭ faksojn per komputilo, sed avertu ilin telefone antaŭ ol vi faksas. Telefon- kaj faksnumeroj: (+36-89) 315-836 (red.) kaj (+36-94) 320313 (vicered.).

Fakaj artikoloj prefere ampleksu 3 ĝis 8 presitajn paĝojn. Pedagogiaj novaĵoj, informoj pri edukaj aranĝoj, interŝanĝaj gazetoj kaj leteroj al la redakcio bonvenas.

Ni recenzas nur ricevitajn eldonaĵojn iel rilatantaj al edukado aŭ utilaj en instruado.